

pola esperantisto

socikultura revuo de
polaj esperantistoj

Fondita en 1906 • N-ro 6/2004 • ISSN 0032-2431



6

2004

Enhavtabelo:

3 *Nokto de Dia Naskiĝo* – Leszek Henryk Łęgowski

4 *REDAKTORE* – Kazimierz Leja

5 *DEKLARO* – Walter Ŝelazny

6 *Diskuto pri entombigo de Czesław Miłosz* – Bogusław Sobol

9 *Eŭropo bezonas komunan lingvon* – Roman Dobrzyński

16 *Ankoraŭ kelkaj rimarkoj pri Martinus-Instituto* – Bożena Pietrzyk

17 *Letero al Pola Esperantisto* – Gary Mickle

LINGVA ANGULETO

18 *La prepozicio TRANS en praktika uzado* – Czesław Baranowski

AKTUALE – EN LA MONDO KAJ MOVADO

20 *Ukrainio* – Eduardo Kozyra

22 *Esperanto variigas laboron en infanĝardeno* – intervjuo kun Grażyna Szubryczyńska (Teresa Nemere)

28 *Bydgoszcz* – Centro pri Kulturo kaj Turismo

29 *Esperanto en la Universitato de Poznań* – Alicja Sakaguchi

32 *Nobelpremiito prof. Selten lekciis...* – W. Stępniewski, B. Kijak

33 *AROMA JALTO 2005* – Volodimir Hordijenko

35 *Membriĝu!* – Maria Majerczak

36 *Rakonto pri Popiel* – Danuta Ŝelińska

Sur la kovrilpaĝo: sankta Nikolao – eltonda paperornamo – verko de la infanoj el elementa apudkrakova lernejo, kiuj deziras al la legantoj de PE feliĉan Kristnaskon kaj la Novan Jaron.

pola
esperantisto

Socikultura revuo de polaj esperantistoj, aperas 6 fojojn jare. Eldonas: Eldonejo HEJME • <http://www.hejme.e-tools.pl> • Redaktoro: Kazimierz LEJA.

**Ĉiujn korespondadojn kaj kontribuojn sendu nur al la redaktoro:
PL 41-250 Czeladź, skrytka 59; retpoŝto: kleja@hejme.e-tools.pl.
tel: (+48 32) 265 00 38**

Jarabono enlanda: 30,00 PLN pagenda al: „Wydawnictwo Hejme”
mBank: 36 1140 2004 0000 3202 3141 1644.

Jarabono eksterlanda: 12,00 EUR pagenda al:

UEA-konto: <kazl-s> aŭ FEL-konto: <leja-t>

N-ro 6/2004 • ISSN 0032-2431 • Eldonkvanto (nakład): 250 ekz.

Nokto de Dia Naskiĝo

(Jesaja 9,1)

Nokto — kiu neniam estingiĝas,
alia de ĉiuj noktoj —
malfermas fenestrojn de nekalkuleblaj koroj
per la lumo de la Vorto, kiu Karno
fariĝis kaj ekloĝis
inter ni.

Nokto — per sopiro de la jarcentoj peza
leviĝas de genuiĝo senmova
en la pastoraloj de kantantaj steloj —
brilo de ĝojo.

Mallumo — per senespero de la tempoj
ploreganta je angoro — tristo,
endormiĝas en la rideto de kontemplado
Naskiĝo de Sinjoro — plej mallaŭte.

Malfido — kun la preĝa Fido
antaŭkuras al la renkontiĝo de la Vero:
Dio fariĝis homo,
por instrui nin reciprokan
amon.

Brilo de Dia proksimeco
trapenetas ĉion kaj ĉiujn
per la Amo.

Meze de la Nokto super la Paŝtista Kampo
ekbrilis la Lumo
en senfina Mistero,
kiu savis la mondon de la eterna
nokto.

Kazimierz Leja

Karaj legantoj de *Pola Esperantisto!*

Finiĝas la dua jaro de aperado de nia revuo. En viaj manoj estas la lasta ĉi-jara numero, feliĉe ne lasta entute... Tiuj ĉi du jaroj de la ekzisto estis tre abundaj rilate al provoj trovi efikan vojon al la pordoj de viaj domoj, kluboj, komunumoj. Viaj reagoj, kvankam nemultaj, tuŝadis *tamen* plej gravajn por vi kaj — mi esperas — por aliaj geesperantistoj, temojn. Al ĉiuj kunlaborantoj mi kore dankas.

En la kuranta numero vi trovos kelkajn erojn, kiuj pruvas, ke esperantistaro *en la mondo* ne tute dormas, kaj ankaŭ ni, poloj, devas vekigi. Parafrazante: „ni evidentiĝu sukcesaj, dank' al sia kapablo agi kuraĝe, impete, vastskale“. Por tio ni bezonas unuigi niajn vicojn, trovi pli modernajn rimedojn kaj uzi jam ekzistantajn. Mia persona revo estas, ke fine ekestu kondiĉoj por komuna organiza agado en la formo de federacio de ĉiuj ekzistantaj E-organizoj en nia lando. Ĉu *tamen* tiu ĉi revo ne estas tro optimisma? Ĉu lastaj gravaj okazintaĵoj ne montras, ke ni, poloj, ne kapablas agi memstare, sed preferas *Deus ex machina*? Prijuĝu vi mem kaj priskribu en viaj leteroj!

Sur la apudaj paĝoj vi povas tralegi la „Deklaron“, subskribitan en Poznań ĉi-jare. Mi atendas reagojn de PEA kaj aliaj E-organizoj. Ĉiuj samtempe havas eblecon ekkoni ĝian enhavon kaj rilati al ĝi. Viajn reagojn denove mi senpacie atendas.

Inter aliaj eroj vi trovos tekstojn, ti-

klantaj i.a. politikajn aferojn, pri kiuj, feliĉe, ĉesas silenti niaj legantoj.

Kiel jam kutime, multajn paĝojn okupas intervjuo, raportoj, sciigoj. Kiel provon mi enmetis ankaŭ memstare de la kontribuintoj preparitajn tekstojn, kiuj pro sia enhavo meritas la atenton.

Ĉu alproksimiĝanta Nova Jaro alportos pli freŝan spiron en niajn vicojn? Mi esperas, ke multaj jam pripensataj kaj eĉ organizataj aranĝoj (inter kiuj la Internacia Junulara Kongreso en Zakopane) altiros novajn membrojn kaj novajn legantojn de nia revuo. Ankaŭ ĝia aspekto iomete ŝanĝiĝos venontjare. Ĉu ankaŭ ĝia populareco? Tio dependas de vi...

Dum pasintaj kelkaj monatoj ek-kreskis la ideo fondi en Pollando Zamenhof-Instituton, kie oni povus trovi lokon por seriozaj zamenhofologiaj kaj lingvistikaj studoj. Por tiu celo kelkaj personoj jam komencis agi... Tiu loko povus esti oportuna inter alie por kolekti Esperantajn librojn, revuojn, gazetojn, kaj organizi profesian bibliotekon (kaj samtempe savi tiujn kuŝantajn sub litoj, en garaĝoj aŭ keloj). Volontuloj, disponantaj pri superflua E-eldonaĵoj, povas sendi ilin al la redakcio de *PE*, kie jam kuŝas unuaj ricevitaj de Zofia Banet-Fornalowa pakaĵoj.

Por tiu ĉi Nova Jaro, kiu galopas al ni, mi deziras al ĉiuj sanon, prosperon kaj multajn eblecojn por praktiki la internacian lingvon. @

DEKLARO

Pasas preskaŭ dudek jarojn de kiam la 17an de oktobro 1985 la Ĉefurba Oficejo de Varsovio likvidis la Ĉefan Konsilataron kaj la Ĉefan Estraron de Pola Esperanto–Asocio kaj nomis la Provizoran Estraron de la Asocio.

Ĉi tiu decido estis kaŭzita pro la interna puĉo de kelkaj tiuepoke relative influaj politike membroj de PEA kiuj havis financajn interesojn «suĉi» la Asocion, kio ne eblis dum demokrataj proceduroj. Ili elprofitis tiaman politikan situacion de la milita stato en Pollando por instigi la administraciajn (kaj plej verŝajne policajn) instancojn por fari la ordon en PEA laŭ siaj propraj stilo kaj intereso.

La 1an de decembro 1992 la direktoro de la Oficejo de la Prezidento de la Ĉefurbo Varsovio esprimis opinion «ke la entreprenita en novembro 1985 decido (...) havis karakteron politike persekutan, sekve ne laŭleĝan». Se la instancoj de la ĉefurbo Varsovio (al kies tiutempe apartenis la jura povo decidi pri la Asocio) detranĉis sin de la eventoj, esperantistaj asocioj ĝis nun silentas. Kaŭzoj estas diverstipaj. Unue: «kaŝi» la honton, due: ŝajnigi la unuecon de la movado kaj ties senkonflikta karakteron, trie: ĉiam substreki ke ekzistas unusola vojo praktiki Esperanton. Ĉiuj ĉi movadaj «dogmoj» restas en la konflikto al la realeco. Esperanto–movado(j) en

Pollando ĉiam estis kaj estas pluralismaj kaj multaspektaj, malfermaj al ĉiuj skoloj kaj tendencoj praktiki Esperanton.

Ni sube subskribitaj, nek partoprenis en la puĉo, nek respondecas pri ties konsekvencoj. Ni rimarkas ke la puĉo kaŭzis foriron de la movado de preskaŭ tuta generacio de valoraj esperantistoj ligitaj tiam inter alie kun la Pola Studenta Esperanto–Komitato, dividis la polan esperantistaron, lasante je la movado ĝis nun negativajn spurojn. Ni volas foriri de ĉi tiu malhonto kaj deklari, ke neniu kaj neniam rajtas elprofiti malfacilajn politikajn cirkonstancojn por aranĝi en la movado siajn privatajn interesojn kaj per la ne decaj metodoj modeligi la movadon laŭ bezono de siaj financaj kaj ideologiaj bezonoj kaj imagoj pri la rolo de Esperanto.

Ĉefe ni volas danki al Kolego Jerzy Leyk, tiama Prezidanto de la Ĉefa Estraro de PEA kaj ties gekolegoj en la gvidorganoj de la Asocio pro ilia starpunkto neniam makuligi sin kaj Esperanton per la nedemokrataj proceduroj.

Ni atendas de aliaj asocioj, ĉefe de Pola Esperanto–Asocio kaj de Universala Esperanto–Asocio esprimi sian starpunkton pri ĉi tiu afero.

Walter Ŝelazny

Diskuto pri entombigo de Czesław Miłosz

Bogusław Sobol

Antaŭ nelonge mia ĉina korespondanto demandis min pri la diskuto, kiu ekestis en pola gazetaro post la morto de pola poeto, Nobel-premiito Czesław Miłosz (legu: Ĉeslav Miŭoŝ).

Temis pri la loko de eterna ripozo de la poeto. Kelkaj homoj asertis, ke la poeto ne rajtas ripozi en krakova sanktejo „Skałka”, kie troviĝas tomboj de polaj merituloj. Por alilandano

estas malfacile kompreni esencon de ĉi tiu disputo. Por ekkompreni iom la aferon oni devas koni implikitan historion de Pollando.

Mi provos klarigi la aferon al tiuj amikoj, kiuj interesiĝas pri literaturo.

En la komenco mi prezentas versajon de Miłosz, kiun li verkis post la enkonduko de „milita stato” en Pollando en 1981 jaro.



Atento:

La deklaro, kvankam publikigita kaj disdonita al ĉirkaŭ 150 partoprenantoj de ARKONES 2004 ne estis subskribita laŭplaĉe, sed nur je la demando de la iniciantoj. La iniciantoj ne opiniis necesan malfermi la liston por pliaj subskriboj. Je nia demando la deklaron subskribis dum ARKONES jenaj partoprenantoj (iliaj nomoj atestas pri la graveco de la deklaro):

Iniciantoj: Chrobak Tadeusz (†), Chmielik Tomasz, Źelazny Walter.

Demanditaj subskribintoj: Chrobak Alicja, Czerwiński Witold, Ertl Istvan, Handzlik Georgo, Janowczyk Paweł, Kowalski Zbigniew, Ligęza Lidia, Rządcki Jerzy, Szaśiadek Sławomir, Sochacki Andrzej, Turbański Grzegorz, Wasik Juliusz, Worsztynowicz-Szydłowska Eleonora.

Vi, kiu faris maljustaĵ'

Vi, kiu faris maljustaĵ' al homo
simpla, aflikton lian ekridante
Arlekenaron ĉirkaŭ vi havante
Jen por konfuzi bonon kun malbono

Eĉ se aliaj antaŭ vi kliniĝis
Virton kaj saĝ' al vi atribuante
Orajn medalojn je l' honor' forĝante
– feliĉaj, ke ankoraŭ unu tag' postvivis

Ne estu sekura!
La poet' memoras
Se vi lin murdos – naskiĝos alia

Kaj ĉiu far', parolo, estos registrita
Pli bona estus por vi maten' vintra
Kaj ŝnur', kaj branĉo pro la ŝarĝ'
kurbita.

(Esperantigis: Jacek)

Czesław Miłosz apartenas al homoj, pri kiuj oni povas aŭdi tute kontraŭajn opiniojn. Multe da poloj opinias, ke li estis granda poeto. Ja, li ricevis literaturan Nobel-premion en 1980 jaro. Antaŭ Miłosz estis 2 poloj, kiuj ricevis Nobel-premion en literaturo: Henryk Sienkiewicz kaj Władysław Reymont. Ili estis tre popularaj, kaj homoj admiris ilin.

Aliaj diras, ke la valoro de liaj verkoj estas duba kaj diskutibla. Kelkaj diras, ke li ricevis Nobel-premion ĉefe pro politikaj motivoj. Do, kia estis Czesław Miłosz?

Czesław Miłosz ne estis tro fama verkisto en sia patrolando. Liaj verkoj, precipe lia poezio, ne estas facila legaĵo. Liaj verkoj estas destinitaj por intelektuloj. Li ne skribis por simpla homo. Tial li ne estis populara, vaste konata.

Miłosz certe ne estis objekto de admiro. Dum longaj 40 jaroj li vivis ekster Pollando kaj dum ĉi tiu periodo liaj verkoj estis malmulte konataj en patrolando. Li ricevis Nobel-premion en 1980 j., kiam li laboris en usona Universitato en Berkeley. Miłosz instruis tie pri pola kaj rusa literaturoj. Post la jaro 1990 li revenis al Pollando kaj ekloĝis en Krakovo. En sia lasta vivoperiodo li ne estis tro aktiva. Li vivis kvazaŭ izolita.

En la unua periodo de sia verkado Miłosz verkis romanojn, poste eseojn kaj poeziaĵojn. Li skribis pri homa implikita vivo, pri diversaj kataklismoj, kiuj minacas al nuntempa homo.

Tamen por kompreni, kial multaj poloj ne ŝatis Miłosz — oni devas iom ekkoni malfacilan historion de Pollando. Tuj post la dua mondmilito Stalin instalas en Pollando registaron, kiu — precipe en la jaroj 1945–1953 — estis senrezerve obeema al Sovetunio. Ĉiu verkisto, kiu apogis la reĝimon estis rigardata kiel perfidulo. Oni opiniis, ke honesta verkisto devas elmigri aŭ... ĉesi sian verkadon. Dume, Miłosz verkis kaj tiamaniere „kunlaboris” kun tiama reĝimo. Post kiam li elmigris el Pollando li kritikis tiaman reĝimon. Tamen multaj homoj memoris ke ĝis la jaro 1951 verkoj de Miłosz estis favorplenaj al tiutempa reĝimo. Li ankaŭ laboris en tiu tempo en diplomata servo. Jen estas la kialo de malvolontemo de multaj poloj kontraŭ Miłosz.

Kritiko de „pola naciismo”

Miłosz naskiĝis kaj loĝis en sia jun-aĝo en la terenoj, kiuj hodiaŭ apartenas al Litovio. Li verkis en pola lingvo, tamen en siaj verkoj li ofte diris, ke li ne sentas sian apartenon al pola gento.

Li sentis ke lia patrujo estas la tuta mondo. Li neis sian ligan kun pola kultura heredaĵo. Li opiniis ke poloj estas tro emaj adori sian kulturen heredaĵon, ke ili estas fanatikaj en sia admiro por sia historio, kulturo. En la tridekaj jaroj estis videblaj naciaj streĉoj inter loĝantoj de Pola Respubliko. En la orientaj teritorioj loĝis naciismaj multoj: litovoj, belorusoj kaj ukrainanoj. Ŝtata politiko kontraŭ ĉi tiuj nacioj ne estis tro favora. Ŝtato forte apogis polan lingvon kaj kulturon,

kaj ignoris emancipaciajn aspirerojn de naciaj malplimulto. En tia situacio kelkaj homgrupoj eĉ diris pri „pola naciismo”. Miłosz apartenis al homoj kiuj kritikis „polan naciismon”. Aliaj polaj verkistoj opiniis ke li kritikis ĉion kio estas pola: polan kulturon, religiajn morojn, politikajn kaj ekonomiajn rilatojn.

Homo, kiu estas kritikema ne estas tro ŝatata. Kaj jen estis alia „kulpo” de Miłosz.

Neglekto de patriotismo

Por kompreni polan patriotismon oni devas scii, ke Pollando por 123 jaroj perdis sian liberecon, kaj estis anektita de najbaraj landoj. Pluraj generacioj devis batali por reakiri sian liberecon. Tial pola patriotismo estis ĉiam „sankta afero”, kaj homo kiu neglektis amon al Patrujo — estis reneĝato.

Miłosz verkis en pola lingvo, tamen en siaj verkoj li ofte skribis, ke li tute ne sentas sin polo. Li substrekadis siajn emociajn ligojn kun litova tero kaj precipe kun la urbo Vilnius. Li ofte kritikis alligon (alligitecon) de poloj al sia nacia tradicio, al patriotismo. En lia opinio poloj tro forte ligis sin al patriotismo, kaj tial ne scipovas verki ion freŝan, novan, korean.

Tia sinteno ne povis plaĉi al multaj poloj. Estis homoj kiuj laŭte diris, ke li ne meritas nomiĝi polo.

Neglekto de pola kultura heredaĵo

En la Krakova sanktejo, kie Miłosz estis entombigota, troviĝas tomboj de meritplenaj verkistoj de pola kultu-

ro, pentristoj, poetoj. Grandaj naciaj herooj. Tial kelkaj homoj demandis: „Miłosz ne tro ŝatis polan kulture heredaĵon. Kial do honorigi lin tiamaniere, kial lokigi lian tombon inter eminentaj patriotoj?” Tiamaniere komenciĝis diskuto, ĉu li meritas ripozi en sanktejo, aŭ ne meritas?

Finfine, la papo Johano Paŭlo II publike aplaudis lian verkadon, kaj tiuj vortoj helpis fini la konflikton. Miłosz finfine ripozis en la sanktejo. 📖



Karaj amikoj!

Aldonu informon pri via loka grupo, klubo, filio, ktp. al „Esperanto grupoj” per simpla formularo. Ne uzu naciajn literojn.

La adreso estas:

www.aliaflanko.de/lokaj_grupoj/index.html

Kun amikaj salutoj

Robert Kamiński, Lodzo, PL

La organizantoj de GRUPE-8 volas esprimi sian dankon al ĉiuj gastoj, kiuj partoprenis la aranĝon. Via ĉeesto kaj kontribuo al la programo konvinkis nin ke nia laboro estas bezonata kaj atendata.

Ni certas, ke ni gastos Vin en la sekvonta jaro dum GRUPE-9 kiun ni antaŭvidas inter 11-13 XI 2005 (de vendredo ĝis dimanĉo).

Amike kaj samideane

Stanislavo Mandrak

EŬROPO BEZONAS KOMUNAN LINGVON

Roman Dobrzyński

Japana industriisto proklamas lingvan revolucion

„Siatempe la japana transportkompanio ‘Jamato’ aperigis tutpaĝan artikolon en la ‘Japana Ekonomia Ĵurnalo’. Tiel la popolo ekkonis pri la malliberaj transportreguloj kaj ekfontis publika diskuto. Rezulte la japana registaro draste liberigis ilin. Poste la prezoj de transportado malaltiĝis je 30% kaj la livertempo duoniĝis, kio donis grandan konkurencon povon en tuta Japanio. Mi kredas, ke tio ankaŭ estas bona maniero por atentigi homojn pri la lingva problemoj”. Jen filozofio, laŭ kiu japana entreprenisto, ETSUO MIYOSHI elspezas grandajn sumojn por propagandi Esperanton.

Kapitalisto kun revoj

Per tia epiteto estis distingita sinjoro Miyoshi dum la „lunĉo–debato”, okazinta la 26an de septembro 2004 en la eleganta varsovia hotelo, kies nomo „Victoria” hazarde koincidas kun la esperantista ideo de la „fina venko”. Etsuo Miyoshi estas granda idealisto, lian idealismon fundamentas religia konvinko. Sian inaŭguran elpaŝon dum la debato li komencis per la vortoj: „Diskonigo de Esperanto estas mia vivcelo, ĉar sinsekvaj spirantaj gvidanti-

noj de mia religio Oomoto instruis, ke dum Esperanto ne adoptiĝos kiel komuna lingvo, monda paco ne venos”.

El la idealismo do Etsuo Miyoshi fontas lia malavareco, kiu tamen baziĝas ne sur revoj, sed sur konkreta kapitalo. Li estras Kompanion „Swany”, kies kvar establoj en Ĉinio kaj unu en Usono donas la enspezon de 60 milionoj da eŭroj jare, kvanakm ĉe la komenco ĝi estis malgranda gantlaborejo kun 40 dungitoj. Li evidentiĝis sukcesa entreprenisto, dank’ al sia kapablo agi kuraĝe, impete, vastskale. Jen la revulo kun la scipovo de kalkulo.

Dum la serĉado de novaj merkatoj la prezidanto de Kompanio Swany renkontis survoje realajn lingvajn barierojn. „Kun mia scio de la angla akirita en lernejoj mi eĉ ne povis mendi manĝaĵon” — li konfesis en sia biografio broŝuro kun religieca titolo: „Per aktiveco ĉielen”. Ĉirkaŭveturante centfoje la terglobon Miyoshi observis privilegian situacion de multaj konkurantoj, kiuj la anglan regis denaske, aŭ lernis ĝin multe pli facile ol li, la aziano. En tiel realaj cirkonstrancoj vekiĝis ĉe li la sento de lingva malegaleco.

Kiam ekonomiaj cirkonstancoj devigis Etsuon Miyoshi transloki fabrikojn el Japanio al Koreio, li ekler-

nis la korean. Sekve pro la samaj kialoj necesis daŭrigi la produktadon en Ĉinio kaj tiam en la animo de la kapitalisto ekfajris ribelo. Li nomis ĝin „lingva revolucio”. „Mi decidis ne plu lerni laŭvicajn malfacilajn lingvojn, mi turnis min al Esperanto, la lingvo, kiu estas reala fundamento por la lingva egaleco”.

Strategio

UEA lanĉas de kelka tempo sian strategian planon. Verdire Ludoviko Zamenhof jam en la „unua libro” skizis la daŭre aktualan strategion. Li indikis du vojojn enmondigi sian lingvon: la „supran” — celantan ŝtatajn kaj aliajn decidpovajn instancojn, kaj la „malsupran” — direktitan al homamasoj. Tamen tiel ruliĝis la radoj de historio, ke la Esperanto-movado iras, ĝenerale, la vojon malsupran. La „raŭmisto” definitive fortranĉis la „flugilojn de facila vento”, farante el siaj deklaroj novan, defetisman religion.

La japana entreprenisto verŝajne neniam aŭdis pri raŭmismo, ĉar li elektis la malpli longan, „supran vojon”. Li kredas la potencon de komunikiloj, ĉefe tiujn de la plej prestiĝaj ĵurnaloj kaj pro tio li aperigas en gravaj gazetoj de la Okcidenta Eŭropo propagandajn artikolojn pri Esperanto kiel pagatajn reklamojn. Ili ĉiukaze englutas kelkajn dekmilojn da eŭroj, la sumon ŝokan por averaĝa esperantisto.

Tiu mono ne falas el la ĉielo, nek ĝi ŝarĝas la buĝeton de la kompanio; ĝiaj ekonomiistoj ne permesus tion. Pre-

zidanto de la Kompanio Swany solvis la problemon jene. Kiel handikapito pro poliomjelito li ekde sia infaneco lamis je la dekstra kruro. „Okazis — li rakontas — ke mia maldekstra piedo dum jaroj troŝarĝata, komencis rifuzi bone funkcii. Mi devis utiligi lambastonon. Iun fojon mi rimarkis, ke la bastono ne devas esti levata ĉiupaŝe, sed povas rulmoviĝi. Dum vojaĝo mi ĉiam bezonas etan valizon. Mi ekhavis la ideon fiksi ĝin je la rulbastono. Post penaj eksperimentoj mi prilaboris prototipon. Ĝi estis patentumita en la tuta mondo kaj fariĝis eksporta furoraĵo de mia firmao. Lastatempe la direktoraro de Kompanio Swany decidis, ke mi rajtas elspezi 10 % de la profito, kondiĉe ke mi rezignu al la kompanio la patento-rajton. Tiel mi atingis monon por popularigi la lingvon internacian”.

La fenomeno Malborko

La „sakbastonoj” estos baldaŭ produktataj en Malborko. La urbeto en la norda Pollando famas pro la historia monumento registrita de UNESKO kiel kultura heredaĵo de la homaro. Ĝi estas teŭtona kastelo el la 13a jarcento, la plej granda en la mondo gotika brikkonstruaĵo. Somere 2003 venis al Malborko s-ro Miyoshi invitita de la loka esperantista klubo. En tiea „Parko de la Mondo” li inaŭguris memorŝtonon sub la ĉerizujo simbolanta Japanion. La parkon iniciatis prezidanto de la klubo d-ro Edward Kozyra. Kune kun siaj klubanoj laŭ la permeso de urbaj instancoj li

ordigis malzorgitan placon en la centra parto de la urbo. Ĝi iom post iom pleniĝas per arboj plantataj de famaj esperantistoj el diversaj landoj. Sensacia evidentiĝis la, okazinta aŭtune 2002, vizito de prof. Reinhard Selten, la germana Nobelpremiito. Pri Malborko subite ekinteresiĝis amaskomunikiloj.

Kiel longjara ĵurnalisto de la Pola TV mi aŭdis de tempo al tempo samideajn riproĉojn: „Kial vi ne propagandas pli Esperanton?” Mi ĉiam respondis: „Esperantistoj, donu al mi ŝancon, faru ion, kio povus esti interesa por la televido”. Kaj venis la ŝanco el Malborko. Post la vizito de Etsuo Miyoshi al la nordpola urbeto mi estis certa, ke la TVP akceptos mian proponon de filmo pri Esperanto. La lingvo internacia ekhavis tie tute novan dimensio; pere de ĝi venis la japana milionulo kaj anoncis la intencon starigi fabrikon en la urbo, kie koeficiento de senlaboreco atingis 37%.

La filmo „Sieĝoj de Malborko”, en kiu gravan rolon ludas esperantistoj, estis dufoje prezentita en la unua kanalo de la Pola TV kaj kelkfoje ripetita en la kanalo por la pola diasporo en la tuta mondo. Etsuo Miyoshi, intervjuita por la filmo, nur aludis la eblecon investi en Pollando. Unu jaron pli malfrue dum la UK en Pekino li deklaris al mia kamerao sian definitivan pretecon investi komence 2 milionojn da eŭroj por produktado de sakbastonoj en Malborko kun la celo fari ĝin sia „fenestro al la Eŭropa Unio”.

La kriptoreklamo

Peresperantaj kontaktoj kun Pollando sendube instigis la japanan entrepreniston direkti sian propagandan kampanjon al la Orienta Eŭropo. Li decidis aperigi reklamojn en la pola ĵurnalo „Rzeczpospolita” kaj en la litova „Lietuvas Rytas”. Mi ricevis la taskon prepari la pollingvan artikolon. La specifaj rilatoj de Etsuo Miyoshi kun Pollando postulis novan alfronton de la temo; ne plu taŭgis la ĝisnuna ŝablono, laŭ kiu oni selektis argumentojn plede al Esperanto. Laŭ propaganda vidpunkto esperantisto investanta milionojn pezas pli ol ĉiuj surpaperaj teorioj. Krome la interesega biografio de s-ro Miyoshi kaj lia eksterordinara personeco ŝajnis „bone vendebla varo”.

Tial mi proponis verki artikolon por „Rzeczpospolita” en la formo de intervjuo. La propono estis akceptita kun la helpo de la prezidanto de UEA d-ro Renato Corsetti kaj la prezidanto de EEU d-ro Seán Ó Riain, kiu krome proponis la titolon: „Kial mi investas en Pollando?” Ĝenerale malfacilas instigi leganton legi reklampaĝon kun anonime listigitaj argumentoj, eĉ la plej saĝaj. Pli da sukceso oni povas esperi, se la samajn argumentojn prezentas interesa persono.

Dum la UK en Pekino mi havis kelkfoje la okazon babili kun Etsuo Miyoshi. Kunlabore kun li pretiĝis intervjuo, en kiu poresperantaj argumentoj estis interplektitaj kun la biografio kaj la sukcesplena agado de la japana indus-

triisto. Tiamaniere la teksto ne okulfrapis per siaj varbaj intencoj. La vorto Esperanto estis uzita „neŭtrale” en la subtitolo: „Intervjuo en Esperanto kun Etsuo Miyoshi, prezidanto de la japana Kompanio Swany”.

La intervjuo aperinta en „Rzeczpospolita” la 25an de septembro 2004 allogis per kolora grandformata bildo de la intervjuito, apogita sur du „sakbastonoj”. Verŝajne la foto kaj la titolo ĉefe altiris la atenton de homoj. El mia persona enketo rezultas surpriza observo, ke multaj legantoj ne rimarkis vorton „pagita anonco”.

Mi aldonu, ke ĉeokaze Pola Esperanto-Asocio ricevis malavaran donacon, ĉar sub la intervjuo estis aldonitaj rutinaj informoj pri la pola movado kune kun la adresoj poŝtaj kaj interretaj. Prilaboris ilin prezidanto de PEA Stanisław Mandrak.

Tra Varsovio al Strasburgo

Okaze de la ĉijara „Tago de Eŭropaj Lingvoj” aperis pagitaj artikoloj ne nur en la pola kaj litova gazetoj, sed ankaŭ en la franca „Le Monde”. Tamen la ĉefa celo de la propaganda agado de Etsuo Miyoshi estas en la jaro 2004 Pollando kiel la plej granda nova membro de la Eŭropa Unio. Li kredas, ke tra Varsovio kondukas la vojo al Strasburgo. „Ĝis aprilo 2004 la Eŭropan Parlamenton konsistigis 624 deputitoj, nun — 732, post la aliĝo de 10 novaj landoj kun 108 deputitoj, inkluzive 54 poloj. Jen reala forto kapabla establi leĝan bazon por la lingva egaleco en

Eŭropo” — asertas la japano.

Ankoraŭ antaŭ la balotoj por la Eŭropa Parlamento Etsuo Miyoshi planis kunvoki polajn (elektotajn) parlamentanojn por la debato pri „Lingva egaleco en la internaciaj rilatoj”. La ideo estis same kuraĝa kiel riska. La pola politika scenejo estas plenigita de pluraj partioj forte batalantaj unu kontraŭ la alia. Malfacilas imagi, ke la polaj eŭroparlamentanoj unuiĝos ĉirkaŭ Esperanto kaj komune pledos por ĝi en Strasburgo. Verdire estus eĉ pli bone, ke unu aŭ alia tute ne okupiĝu pri Esperanto por ne kompromiti ĝin. Krome parto de ili tutcerte konsideras la lingvan problemon jam solvita pere de la angla.

La balotoj por la Eŭropa Parlamento, okazintaj junio 2004, alportis en Pollando esperigan rezulton, ĉar elektiĝis du esperantistoj. Unu el ili, prof. Bronisław Geremek estas persono kun granda prestiĝo kiel sciencisto kaj kiel heroo de la kontraŭkomunista rezisto. La alia, Małgorzata Handzlik estas „ĝisoste” esperantistino. Nur pro tiu ĉi duopo valoris organizi la debaton. Bedaŭrinde prof. Geremek ne trovis liberan tempon por kunlabori por nia ideo.

Tamen la organiza maŝino startis, gvidis ĝin la plej proksima kunlaboranto de Etsuo Miyoshi en Pollando, d-ro Edward Kozyra el Malborko. Formalaj invitantoj estis prezidanto de Kompanio Swany Etsuo Miyoshi, kiu pagis la tutan aranĝon, kaj direktoro de „Radio Polonia” Michał Malisz-

wski kune kun estrino de la Esperanta Redakcio Barbara Pietrzak. En la bele presitaj invitiloj ankaŭ troviĝis nomoj de specialaj gastoj kaj samtepe prelegantoj, prof. Reinhard Selten, la Nobelpremiito kaj prof. Ludoviko Kristoforo Zaleski–Zamenhof, la nepo de la kreinto de Esperanto.

Nova stilo, sama sento

La 26an de septembro 2004 estis dimanĉo, kiun ornamis belega vetero. Tiu tago, la lasta varma dimanĉo de la jaro, kutime abundas per distraj, kulturaj kaj politikaj aranĝoj. Krome ĝi estas la „Internacia Tago de Koro” kaj la tute nova „Tago de Eŭropaj Lingvoj”, pri kiu ĝis nun aŭdis nur malmultaj homoj en Pollando. Jen la cirkonstancoj, kiuj akompanis la lunĉo–debaton pri la lingva egaleco.

La komenco estis impona kaj kortuŝa: infana koruso el la urbeto Pelplin kantis en la germana, pola kaj Esperanta lingvoj la „Odon al ĝojo”, la solan himnon en la mondo, kiu ne povas esti kantata komune pro manko de komuna teksto. La rolon de mastrino ludis lerte Barbara Pietrzak. La malferman paroladon faris prezidanto de la Kompanio Swany, Etsuo Miyoshi. Sekve prelegis prof. Ludoviko Kristoforo Zaleski–Zamenhof, kiu el sia propra praktiko de konstruĝeniero kaj profesoro de pluraj altlernejoj en diversaj landoj — citis ekzemplojn de la lingvaj malfacilaĵoj kaj kontraŭstarigis al ili la paradoksan historion de persekutoj de Esperanto, kies viktimo li

mem siatempe estis.

La Nobelpremiito, prof. Reinhard Selten, kiel specialisto pri ekonomio kaj matematiko, faris analizon de diversfacetaj cirkonstancoj, kiuj akompanis la fondon kaj evoluon de la Eŭropa Unio. Sur tiu vasta fono ekonomia, politika kaj kultura, li prezentis diversajn aspektojn de la lingva problememo en la Eŭropa Unio. Li kritikis la aktualan praktikon kiel ne plu elteneblan finance kaj netolereblan morale, ĉar ĝi kontraŭstaras la idealojn de la Eŭropa integriĝo, malrespektante la lingvan egalecon. Prof. Selten finis sian prelegon per romantikisma konkludo. Li retroiris kvaronjarcenton ĝis la jaro 1979 kaj prezentis ekzemplojn de diversaj teknikaj, ekonomiaj kaj politikaj faktoj, kiuj tiam ŝajnis fantazio kaj nun estas rutina realaĵo. Kiu kredis en la jaro 1979, ke, ekzemple, la tri tiamaj respublikoj de la „eterna Sovetunio” fariĝos ne nur sendependaj ŝtatoj, sed ankaŭ membroj de la Eŭropa Unio. Li konsilis same rigardi la perspektivon de venontaj 25 jaroj kaj vidi Esperanton kiel la realan celon. „Estu realismaj, realigu la neeban!” — diris la eminenta germana sciencisto.

La debato

La pioniran aranĝon en Varsovio partoprenis — el inter centoj da invititoj — 48 personoj, inkluzive 8 politikistoj kaj 4 eŭroparlamentanojn. La ceteraj estis elstaraj esperantistoj kaj ĵurnalistoj. La debato evidentiĝis vigla kaj surprize pozitiva. D-ro Zbig-

niew Kulak, estro de la Eksterlanda Komisiono de la pola Senato elpaŝis kun parolado, kiu povus esti tute bone prezentita en Pekino enkadre de la kongresa temo: „Lingva egaleco”. Prezidanto de UEA, d-ro Renato Corsetti — verŝajne por ne ripeti la argumentojn de la senatano — devis eĉ modifi sian oratoraĵon. Li rimarkis, ke milionoj da homoj tra la mondo, inter ili la „japana kapitalisto kun revoj”, rigardas al Eŭropo kun esperoj kiel al la patrujo de ĉio bona. Vere justeco kaj egaleco inter la homoj kaj popoloj estas la rokoj, kiuj estas la bazo de nia tuta konstruaĵo. Tamen en Eŭropo justeco kaj egaleco sur la kampo de lingvoj kaj kulturoj restas daŭre en la sfero de bonaj deziroj. Kiel Esperanto povas helpi en ĉi tiu situacio? La demandon sekvis celtrafaj respondoj.

Fakte ĉiuj partoprenantoj de la debato provis laŭ diversaj vidpunktoj respondi tiun ĉi demandon. La litova parlamentano Stasys Kružinauskas emfazis interalie la rolon de Esperanto en la defendo de malgrandaj lingvoj kaj la helpon de la litova registaro rilate al Esperanto-movado. La pola eŭrodeputitino Małgorzata Handzlik, konata en la movado kiel Margareta, ne varbis por Esperanto, sed rakontis pri siaj spertoj en Esperantujo kaj kontraŭstarigis al ili absurdojn de la multlingveca komunikado. Ne eblas malatenti la formon de ŝia parolado, plenan de temperamento kaj virina ĉarmo. Fakte Margareta estas la „homo de sukceso”, ŝi ekde 20 jaroj gvidas

la radion, fondis instituton por trejni instruistojn, establis lingvolernejon kaj kunlaboras kun sia edzo Georgo en lia eldonejo.

Alia eŭrodeputito, kiu elpaŝis dum la debato, Ryszard Czarnecki surprizis per sia pozitiva rilato al Esperanto sekve de ĵus akiritaj spertoj en la Eŭropa Parlamento. Li interese bildigis la „Strasburgan Babelturon” ne nur el la vidpunkto de la lingvaj malfacilaĵoj, sed ankaŭ kiel la kampon de batalo inter la „grandaj lingvoj”. „Se pro manko de pola interpretisto — diris Czarnecki — mi uzas la germanan, tuj protestas francoj kaj britoj”. La pola eŭrodeputito proponis fondi en Strasburgo superfraccian grupon, kies celo estus okupiĝi pri la lingva komunikado en Eŭropo.

Fakte la ideo ne estas nova, lanĉis ĝin siatempe d-ro Renato Corsetti. En la antaŭa deĵorperiodo de la Eŭropa Parlamento aktivis tiuspeca grupo. Cetere tuj post sia elektaĵo ekagis tiudirekte Margareta Handzlik. Tamen la relanĉo de la ideo pri praktika agado sur la Strasburga forumo oni povas konsideri la plej grava rezulto de la Varsovia lunĉo-debato.

La rimarkoj

La debato montris kiel fortan intelektan bazon posedas nia movado, ke ĝi disponas pri multaj prestiĝhavaj personoj, kiuj kapablas saĝe kaj konvinke argumenti por Esperanto. Krom la menciitaj parolantoj elpaŝis interalie rektoro de AIS, prof. Helmar Frank kaj

vicrektoro de la Teknika Universitato en Lublino, prof. Witold Stępniewski. Al tiu ĉi listo oni povas aldoni multajn aliajn nomojn de la esperantistaj intelektuloj tra la mondo.

La moderna komputila epoko favoregas nian agadon. Jen esperantistoj el la malgranda provinca urbeto sukcese organizis tiun senprecedencan aranĝon en la granda ĉefurbo, en la luksa hotelo. Laŭ kriterioj de averaĝa esperantisto la lunĉo-debato kostis multe. Jes, sed la necesa mono reale ekzistis, elspezis ĝin la japana kapitalisto. Tiu ĉi fakto ne konfirmas la lanĉatan lastatempe tezon, ke la financaj potenculoj kaj decidpovaj politikistoj ne bezonas Esperanton kaj estas vanaj la provoj varbi ilin. Spite al tiu defetisma opinio la Varsovia debato pruvis, ke ili estas troveblaj. Oni devas nur trovi vojon al ili.

Oni strebu alfronti la eksteran mondon, dum en la nuntempa movado videbliĝas la tendenco fermiĝi en propra kaĝo kaj fari „ŝajnajn movojn”. Kiel ekzemplon mi citu la „Proklamon de Poznano”, kies plena titolo konsciigas kuriozecon de ĝia enhavo: „Proklamo pri elĉerpigo de paradigmo finvenkismo-raŭmismo”. Dum la preparado de la debato rimarkiĝis alia specifeco de pluraj samideanoj. Ili kutime nenion faras, sed kiam aliaj eklanĉas sian projekton, ili tuj aperas kun bonaj konsiloj kaj kritikoj. Tiamaniere ili fariĝas gravaj personoj ĝis la fino. Se la rezulto estas sukcesa, ili tuj proklamas sin ĝiaj patroj (ĉar ili bone konsilis), se —

fiaska, kulpas tiuj, kiuj ne obeis ilian kritikon.

Same antaŭ la debato, kiel post ĝi aŭdiĝis opinioj, ke la mono povus esti elspezita pli utile ol por gazetreklamoj kaj luksa manĝaĵo en la hotelo „Victoria”. Jes, eble, tamen por decidi, kiel elspezi monon, oni devas ĝin havi. Estas ĝuste s-ro Miyoshi, kiu ĝin havas. Liaj ekonomiaj sukcesoj, dank’ al kiuj li fariĝis la „reĝo de gantoj”, pruvas, ke li kapablis celtrafe elspezadi sian monon. Kial ni ne kredu lian sperton kaj scipovon?

La demandoj

Komenciĝas sturmo al la Bruse-la Babelturo, ene de kiu la ĉefan rolon devos ludi eŭroparlamentanoj. Kiel subtenu ilin nia movado?

Por respondi tiun ĉi demandon, necesas unue starigi multajn aliajn, grupigi ilin laŭ pluraj kriterioj kaj serĉi respondojn laŭ diversaj vidpunktoj. Ekzemple: Kiel en la nova Eŭroparlamento povas organiziĝi influpova poresperanta frakcio? Se ĝi fariĝos grava fakto, kiun celon ĝi havu? Kiun funkcion ĝi atribuu al la lingvo internacia? Ĉu Esperanto fariĝu estonte en la Eŭroparlamento unu el multaj malgrandaj lingvoj aŭ ĝi estu unu el laborlingvoj aŭ eble funkciu kiel ĉefa komunikilo? Kiel Esperanto adaptiĝu al tute novaj praktikaj taskoj? Kiel kaj per kiu mono ĝi riĉigu siajn fakajn terminarojn? Ĉu ni ne komencu jam nun „ekzercigi” mian lingvon kaj, ekzemple, Esperantigu la novan EU-konstitucion? ➤

Ankoraŭ kelkaj rimarkoj pri Martinus–Instituto

Bożena Pietrzyk

Estas por mi tre agrable trovi en „Pola Esperantisto” nro 5/2004 la impresojn de M. Romanowska, kun kiu mi pasintjare trapasis unu semajnon en Klint. Tamen mi volas precizigi, ke la sidejo de Instituto trovigas en Kopenhago ĉe la strato Mariendalsvej 96, kaj en Klint apud Nykobing en nor-



↪ Ni pensu, kiel uzi la propagandan kontribuon de la japana milionulo. Ne necesas esti granda esperantologo por konstati, ke la penoj de Etsuo Miyoshi ne estos plene efikaj, se ne fundamentos ilin aktiva kaj celkonscia esperantistaro. Estas bone, ke s-ro Miyoshi strikte kunlaboras kun UEA. Tamen ĉiuj esperantistoj devas nun kompreni, ke la Strasburga Parlamento tutcerte ne voĉdonos por la lingva projekto, eĉ perfekta, sed konsideros nur la faktan, reale praktikatan lingvon. Unu el la metodoj montri la ekziston de Esperanto estus prezentado de saĝaj projektoj kun samtempa postulo de mono por ilia realigo.

Demandoj multas, problemoj stapliĝas, ĉar Esperanto provas grimpi sur la „supran” nivelon de sia disvastiĝo. Eble pro tio valoras okupiĝi pri ĝi pli ol kiam ajn. ■

da parto de Selando ĉe la markolo Kattegat situas Feria Centro, (100 km de Kopenhago).

Mi plene konsentas kun s-ino Marta pri la beleco de tiu ĉi loko kaj amika etoso, kiu tie regas, kvankam mi ne povas akordi kun la konstato, ke la kosmologio ne interesas polajn esperantistojn.

Dum la Universalaj Kongresoj ĉiam okazadas prelegoj pri tiu ĉi spirita scienco, kaj ĉiam la salono estas plenkonsista; inter la aŭskultantoj ankaŭ poloj ĉeestas.

Ĉijare mi estis en Danio la kvaran fojon kaj bonŝance mi ne estis sola el nia lando.

Nun kune kun mia koleginino el urbo Ełk ni kunlaboras kun la Instituto tradukante el Esperanto en la polan la verkon de Martinus „La eterna mondbildo” (4 volumoj, 450 paĝoj).

La verko estas suplemento de lia ĉefverko „Livets Bog” (La libro de vivo), konsistanta el sep libroj.

La libroj de Martinus, kiu verkis nun dane, estas tradukitaj kaj daŭre tradukataj en multajn fremdajn lingvojn; preskaŭ ĉiuj estas tradukitaj en la svedan, ĉeĥan, Esperanton, anglan kaj germanan, multaj en nederlandan, serban, rusan, francan, hispanan, ankaŭ en islandan, hungaran ĉinan, japanan, rumanan. Ni strebas, por ke kvankam kelkaj verkoj aperu en la po-

la lingvo.

Pasintjare dum la poznana ARKONESO mi kuraĝis fari mallongan prelegon sub titolo „Kosmologio — optimisma vivkoncepto”.

La filozofio de Martinus estas laŭ mi vere optimisma. Li diras, ke la vivo estas eterne egzistanta proceso, kaj la senco de la vivo estas vivtravivado mem. La helaj kaj malhelaj travivaĵoj, ankaŭ la suferoj, kiuj nin renkontas ĉi tie sur la tero estas necesaj eroj en la evoluo antaŭen al pli grandaj kaj pli helaj vivtravivaĵoj. La mondotuto kaj la estado estas ĉioampleksa viva makroestulo, en kiu ni ĉiuj vivas. Tiu makroestulo estas tiu, kiun ni en religioj nomas: Dio, Alaho, Budao, ktp. En kosmologio tiuj nomoj liberiĝas de tiuj ŝajne naivaj kaj senlogikaj kredoj, kiuj kaŭzas, ke multaj homoj estas ateistoj kaj neglektas religion. Ankaŭ preĝo fariĝas konscia, intelekta, senta kaj intuicia kontakto kun la makroestulo kaj kondukas al harmonio kun ĉio kaj ĉiuj. La kosmologio montras, ke esence „ĉio estas tre bona”.

P.S. Mi aldonas foton de filozofo kaj verkisto Martinus (1890–1981).



Letero al *Pola Esperantisto*

Gratulon al la redakcio de *Pola Esperantisto* pro la decido aperigi la artikolon „Pri la milito en Irako” de Władysław Burszta (n-ro 5/2004). Alie ol la redaktoro de la revuo, mi opinias ĝin tre konvena por esperantista revuo — pro du kialoj.

Unue, movado, kiu pretendas diri ion validan pri monda paco kaj internaciaj rilatoj, apenaŭ povas struite ignori murdan militon, kiu atencas kontraŭ la internacia juro. Des malpli militon komencitan de Usono, la lando, kiu estras la NATO-aliancon, en kies ŝtatoj—membroj — mem militkomplicoj en kelkaj kazoj — loĝas proksimume duono de la esperantistoj en la mondo.

Due, troa zorgo pri la (plej ofte fiktitiva) „neŭtraleco” de iuj Esperanto—asocioj nur inklinas esperantistojn kritiki la imperiismon oblikve — per la laŭsupoze pli konvena temigo de „kultura” kaj „lingva” imperiismo. Sed tiu diskurso estas tro ofte pseŭdoprogresema falsajo, speco de malbone vualita ksenofobio, kiu disvastigas timobsedojn pri „identecperdo” kaj „trofremdiĝo” konekse kun lingvaj influoj devenantaj de la angla k.s. Ĉu estas hazardo, ke UEA kaj EEU ĝuste en la nuna konjunkturo de mondaj eventoj decidis intimiĝi kun asocioj de „lingvodefendantoj”?

Pli bone, ke esperantistoj nomu la imperiisman agresadon per la ĝusta nomo kaj ataku ĝin sen ĉirkaŭvojoj.

Czesław Baranowski

La prepozicio **TRANS** en praktika uzado

La prepozicio **trans** havas la signifon de rilato al la alia flanko, kiu povas enteni ideon: **de senmoveco** (= **sur** la alia flanko), aŭ **de almovo** (= **al** la alia flanko). **Ekz.:**

Mia amiko loĝas **trans** la rivero (sur la alia flanko de la rivero). Ŝi loĝas kontraŭ mia domo, **trans** la strato (sur la alia flanko de la strato). Pramŝipo veturigis nin **trans** la maro (al la alia flanko de la maro). L. Zamenhof tre malofte uzis **trans** en la unua senco (ili jam estas **trans** montoj kaj maroj), krom se ĝin antaŭis alia prepozicio: tio estas belaj rakontoj **el trans** la montoj; mi prenis vian patron **de trans** la rivero; Tiun unuan sencon li kutime esprimis per **transe de** (transe de la mallarĝa kampa vojo staras malnova kavalira kastelo). Oni povas facile rimarki, ke L. Zamenhof donas preskaŭ ĉiam al **trans** la nuancon de almovo, uzante tamen post ĝi nominativan adjekton: niaj pensoj iras **trans** limo sen pago kaj timo (= al alia flanko de limo). Multaj verkistoj imitis la kutimon de nia majstro kaj ni ankaŭ tion faras nuntempe.

• **Jen la prepozicio trans montranta movon al alia flanko de io:**

La aviadilo flugis **trans** la oceano. La vojo kondukis **trans** multaj torenoj. La kantado de parohanoj penetradis **trans** la strato, ĝis la kontraŭe staranta domo.

Rimarko: Oni povas uzi **trans** kun direkta **n**-finaĵo por pli forte akcenti, ke temas pri movo al loko troviĝanta aliflanke de io. **Ekz.:** La hirundoj flugis **trans** la lageton, ĉar **trans** la lageto troviĝis jam aliaj hirundoj. Mi ofte iras **trans** la riveron por renkontiĝi tie kun mia amiko. Por butikumi ni devis iri **trans** la straton, ĉar tie troviĝis multaj butikoj. Ĵetu la pilkon **trans** la muron (super la muro al alia flanko). Zamenhof klarigis tamen, ke direkta **n**-finaĵo ĉe mova **trans** ne ĉiam estas deviga.

Ni neniam konfuzu la prepozicion **trans** kun la prepozicio **tra**. Transmovo iras super aŭ sur io kaj tramovo iras ene de io. **Ekz.:** Mi saltis **trans** la barilon (mi saltis super la barilo al la alia flanko). Mia filo kuris **tra** la barilon (li kuris tra truo en la barilo al la alia flanko). La diferencon inter **tra** kaj **trans** bonege montras la jena Zamenhofa ekzemplo: Mi forkuris **trans** marĉojn kaj kampojn, **tra** nudaj bariloj kaj senfoliaj arbaroj, al la libera maro.

Rimarkoj: Uzi **trans** en la tramo-va senco (iri **trans** la kampo, **trans** la parko) estas simpla eraro, ĉar tramo-vo estas ĉiam esprimata helpe de la prepozicio **tra** (tra la kampo, tra la arbaro, tra la stepo, tra la dezerto, tra la ĉambro, tra la koridoro ktp.). **Inter la esprimoj:** *iri tra la strato* (en la strato, laŭ ĝi de unu loko al la alia) kaj *iri trans la strato* (al la alia flanko de la strato) estas rimarkebla diferenco. Por pli granda klareco oni ofte diras: *ni iris trans la straton* aŭ *ni transiris la straton*. (ni iris de unu flanko sur la alian). La suban aŭ supran tramovon signas **sub** aŭ **super** kun **trans**, **ekz.** **transnavigi** sub ponto; **transflugi** super montpinto; **transsalti** super la reloj.

- Por esprimi movon transversan, oni tre ofte uzas **trans** prefiksoide: **transiri**, **transkuri**, **transplanti** (**transplantiĝi**), **transporti**, **transskribi**, **transdoni**, **transpreni**, **transturni**, **transvivi**, **transformi**, **transjeti**, **transatendi**, **transiĝi**, **transpasi**, **transmigri**, **transverŝi**, **transfiguri**, **transruli**, **transtera**, **transoceana**, ktp.

Tiun ĉi uzadon de la prepozicio trans montras la jenaj ekzemploj:

Ni **transiris** la torenton en ŝuoj. Ŝi rapide **transkuris** la straton. Helikoptero **transflugis** super la tegmento de mia domo. Rapidaj motorboatoj **transnavigas** ankaŭ sub pontoj. Oni **transplantas** arbojn, por doni al ili pli da forto. **Transplantado** de homaj organoj estas nun praktikata en multaj landoj. Pluraj radikoj el la okcidentaj lingvoj **transplantiĝis** en Esperanton.

Ni **transportis** la fotelon el nia salono en la dormoĉambron. Ĉu vi jam **transskribis** la tekston de mia kanto? Mi jam **transdonis** informilojn pri la 27a ĈEP al ĉiuj Filioj de PEA. Mia juna najbaro **transprenis** riĉan patraheredaĵon. Por trarigardi la gazeton mi rapide **transturnis** ĉiujn paĝojn. Belaj edzinoj ne ĉiam **transvivas** siajn edzojn. Barbo povas **transformi** viron ĝis nerekonleco. La akcidento **transformiĝis** en katastrofo. La mara ondo **transjetiĝis** super la dronanto. Ni devis **transatendi** la malbonan veteron kaj poste ni feliĉe **transpasis** la Alpojn. Aŭtune la cikonioj **transmigras** al sudaj landoj. Ŝi **transverŝis** vinon el granda botelo en kristalan karafon. La ĝojo kaj amo ŝin **transfiguris** (donis al ŝi pli brilan, noblan figuron). La **transoceana** flugo daŭris 3 horojn. Ni estas profunde konvinkitaj pri **transtera** (**transtomba**) vivo.

Rimarko: Inter la esprimoj: **transflugi super tegmento** kaj **flugi trans tegmenton** estas nuanca diferenco. La unua ekzemplo signas simplan tramovon; la dua akcentas, ke la celo de la flugo troviĝas **trans** la tegmento. (PAG § 191).

- La prepozicio **trans** ricevas ofte la finaĵojn **-a**, **-e**, ekzemple: la transa trotuaro, la transa bordo, la transa angulo (**transa** = estanta transe).

Mia domo troviĝas transe de la strato. Ŝia voĉo sonis transe de la granda kurteno. La infano staranta transe de mia domo atendas la patrinon (**transe** = en transa loko).

UKRAINIO

Karaj,
min persone ĝojas la vekigado de demokratio en Ukrainio, mi deziras al ukrainanoj forton por la fina venko kaj fakta libereco kaj sendependeco de Ukrainio. Tiam do estus eblecoj por Ukrainio aniĝi al Eŭropa Unio, la lan-



↪ Oni povas ankaŭ diri: **transigi** iun per boato **trans** la lagon; **transigi** informon al la kompetenta instanco; tiu ĉi **transigilo** **transigas** elektran energion; mia vivenergio estas **transigeb**la al neniu; tiu ĉi torento estas facile **transirebla**; baldaŭ ni **transiĝos** en alian loĝejon; juna **transulo** (tiu, kiu loĝas transe) bele ludas gitaron.

*Jen kelkaj proverboj kun la prepozicio **trans** el la Proverbaro Esperanta prilaborita de Ludoviko Zamenhof:*

— Kiu trans muro aŭskultas, tiun la muro insultas.

— En landoj transmaraj estas oraj arbaroj.

— En ĉiu translokiĝo estas parto de ruiniĝo.

— Ĉio transmara estas ĉarma kaj kara.

— Belaj rakontoj el trans la montoj.

— Oni ofte transiras de rido al larmoj.

do kun ĉirkaŭ 55 miliona popolo kaj kun nova lingvo ukraina estus la ŝanco por venko de Esperanto kiel pontolingvo por Eŭropo!

Sed, estas ankaŭ malĝojaj simptomoj, ekzemple la akraj kritik-vortoj de nuna prezidento Leonid Kuĉma kontraŭ Nobel-premiito Lech Wałęsa, ke li enmiksiĝas en internajn aferojn de Ukrainio — tio signifas, ke Kuĉma kaj lia taĉmento nenion komprenis de tiu leciono. Oni devas daŭrigi manifestaciojn en Kievo kaj en aliaj urboj, ĉar sen tio ne povas venki Viktor Juŝĉenko kaj la demokratiaj fortoj en Ukrainio. Nia pola apogo estis tuja kaj multe jam helpis al naskiĝanta demokratio en Ukrainio kaj devigis pli kuraĝe reagi Eŭropan Union (Eŭropan Parlamenton kaj Eŭropan Komisionon). Tio estus ŝanco ankaŭ por Pollando plibonigi la historiajn rilatojn inter niaj popoloj, kaj tio fakte nun, en kelkaj lastaj tagoj vekigās.

Ni esperantistoj de Eŭropa Unio devas ankaŭ influi kaj informi esperantistojn el Ukrainio, speciale el Orienta kaj Suda Ukrainio, kie per amaskomunikiloj oni misinformas la popolon kaj deziras ĝin dividi je du partoj por pli facile regi super la dividita popolo.

Amike, Eduardo Kozyra

PRI LA ALIĜO DE LA ESPERANTA CIVITO AL LA MONDA SOCIA FORUMO

La aliĝo al la Monda Socia Forumo estas decido kun politika signifo, ne kun krude lingvopropaganda celo. Per tiu aliĝo (demokratie decidita de la Senato) la Esperanta Civito esprimas sian intencon kontribui al la formulado de rolo por la unika parolkomunumo, kiun identigas esperanto, en la konstruado de alia ebla mondo.

La salutmesaĝo kiun la Konsulo sendos al Porto–Alegro, la kontribuo de eventuale ĉeestanta senatano al diversaj debatoj, la flegado de rilatoj kun diversaj realaĵoj (ekzemple la Kongreso de la Popoloj) estas do motivitaj unuavice ne de la emo simple reklami komunikilon, sed de la bezono digne prezenti novan popolon (kio ne estas sinonimo de nacio), emfazante la mondrepresentan funkcion de la transnacia lingvo esperanto, ne nur la komunikan funkcion.

La strategio de la Esperanta Civito bonvenigas la fakton, ke aliaj esperantistoj iras al MSF por surmerkatigi nian lingvon (per budo, flugfolioj, glumarkoj, rubandoj ktp); sed la Civito ne haltas je tio. La Civito agas laŭ siaj eblecoj kaj sia nivelo, ĉar ĝi ne estas asocio, sed alio. La bona evoluo de la rilatoj kun la mondcivitanaj movadoj estas unu el la pozitivaj rezultoj de ĉi tiu agado. El tio profitas kaj la reputacio de Esperantio kaj la prestiĝo de ĝia lingvo. Pri pliaj rezultoj raportos HeKo.

Walter Ŝelazny, Konsulo

ZAMENHOFOLOGIA SEMAJNFINO TRE SUKCESA

„Fundamento: ĉu koncepto nur lingva?” — vigla studgrupo (el kvar landoj kaj tri kantonoj) partoprenis la Novembran Semajnfino de KCE pri la Fundamento de Esperanto, sub la gvido de c–ano Francisko Degoul.

Post esploro ĝenerale pri la origino de la verko kaj specife pri la signifo de ĝia „netuŝebleco”, la studgrupo alfrontis la demandon: „ĉu por Zamenhof la koncepto de ‘fundamento’ ligiĝas nur al la lingva tereno?”. Fakte per la Dogmoj de Hilelismo en 1906 Zamenhof difinis ankaŭ etikan fundamenton, pri kiu la esperantistaro interesiĝis multe malpli. El tio rezultis ankaŭ la etika krizo de la esperantismo, kiu ne trovis en la Bulonja Deklaracio la ilon taŭgan por malpermesi la pornaziajn kaj similajn deflankiĝojn de la tiama Movado.

Laŭ Degoul, la Munkena Deklaracio (1952) provis ŝtopi la breĉon per aserto, ke el uzado de la internacia lingvo „rezultos (...) plifirmigado de la tuthoma solidareco kaj rapidiĝo de la procezo de unueciĝo de la homaro”. En tiu frazo nebule manifestiĝas influo de la homaranisma pensmaniero kaj de la hilelisma „fundamenta leĝo”.

Tiu bezono de etika fundamento por Esperantio, same kiel necesis lingva fundamento por Esperanto, manifestiĝis en ĝis nun plej alta grado tra la Pakto por la Esperanta Civito, kiu spertas ĉe kelkaj precize la saman

tipon de rezisto kiun spertis la ideoj de Zamenhof pri etike fundamentita „neŭtrale homa popolo”.

Riĉaj debatoj (al kiuj „Heroldo de Esperanto” dediĉos apartan paĝon) naskiĝis el la prezento de mag. De-goul.

Dankon pro via atento.

fonto: **Heroldo Komunikas**



ESPERANTO VARIIGAS LABO- RON EN INFANĜARDENO

(Intervjuo kun Grażyna Szubry-
czyńska — instruistino el infanĝardeno
en Toruń)

— **En la toruna urba gazeto „No-
wości” aperis informo, ke la loka
infanĝardeno „Kangurek” pere de
Esperanto ligis kunlaboron kun iu
infanĝardeno en Ĉinio. Laŭ mia scio
vi laboras en tiu toruna infanedu-
kejo kaj vi estis iniciatinto de tiu ĉi
evento. Kiamaniere tio okazis?**

— Mi ŝatas mian laboron kun in-
fanoj kaj mi ŝatas Esperanton, dank’
al kiu mi ekkonis multajn lokojn kaj
multajn homojn en la mondo. Serĉante
novajn, interesajn formojn por mia la-
boro, mi decidis utiligi Esperanton.

— **En infanĝardeno — interese!
En kiu formo vi faris tion?**

— Celante proksimigi miajn infa-
nojn al aliaj landoj, mi decidis invita-
di por renkontiĝoj en la infanĝardeno
esperantistajn gastojn el diversaj lan-

doj. La unua renkontiĝo kun la hispa-
no Augusto Casquero de la Cruz estis
tre sukcesa kaj plaĉis ne nur al la infa-
noj, sed ankaŭ al mia direktorino.

— **Ĉu poste sekvis ĉinoj?**

— Ankoraŭ ne. Januare 2004 mi
ricevis mesaĝon de la ĉina samide-
ano Dong Shulin, kiu aŭdis pri mia
infanĝardena eksperimento de deve-
nantaj el Toruń esperantistoj — mond-
vojaĝantoj Marzena kaj Wojtek. Li
sendis demandon de sia kuzino — di-
rektorino de porinfana edukejo en Za-
ozhuang, ĉu nia infanĝardeno dezirus
kunlabori kun ŝia helpe de Esperanto.

— **Certe tio ĝojigis vin, sed ĉu tiu
ĉi propono plaĉis ankaŭ al via direk-
torino?**

— Mia direktorino ne estas espe-
rantistino, sed kun intereso kaj sim-
patio ŝi observis mian eksperimenton,
apogis ĝin. Ĉifoje ankaŭ kun rideto ŝi
respondis: „Kial ne?”

Sekvis monatoj de la interreta dis-
kutado, reciprokaj prezentoj de la la-
boro, informoj pri organizaj aferoj, re-
ciprokaj salutoj de infanoj, interŝanĝo
de fotoj ktp.

— **Rezulte de tio estis subskribita
oficiala interkonsento pri kunlaboro
de ambaŭ infanedukejoj. Ĉu ankaŭ
tion vi faris per interreto?**

— Ho ne, la oficiala subskribo de
la interkonsento pri ĝemeliĝo de niaj
infanĝardenoj okazis la 1an de aŭgusto
en Zaozhuang. Ĝi estis organizita tre
solene: la ceremonion ĉeestis la loka
urbestro, aliaj eminentuloj de la ur-
bo kaj ĉ. 300 persona publiko (grand-

parte gepatroj de la ĉinaj infanoj), kun belega infana dancprogramo. La ceremonio estis raportita en la lokaj gazetoj kaj televido kaj... kronita per la solena bankedo!

— **Ĉu reprezentantoj el Toruń povis persone partopreni la okazintaĵon?**

— Jes, okazis preskaŭ miraklo. Duope: la direktorino de nia infanĝardeno kaj mi, ni veturis ĉi-cele al Ĉinujo. Ĉinaj organizantoj deklaris kovri ĉiujn kostojn de nia restado kaj post longa, peniga strebado ni sukcesis ricevi en Toruń helpon por povi kovri la vojaĝkostojn.

— **Certe multaj personoj en Toruń admiris kaj enviis vin, ĉu ne? Kaj, ĉu krom la subskribita kunlaborkontrakto vi vidas aliajn valorajn rezultojn de tiu ĉi longa kaj ja malfacila vojaĝo?**

— Multajn. Ni multe vidis, multon travivis kaj neniam ni forgesos tion, sed la plej gravaj laŭ mia opinio estis du aferoj. Unue — la okazo por pliriĉigi niajn pedagogiajn spertojn. Ni povis observi, kiel rilatas al infanoj ĉinaj instruistinoj, observi iliajn lecionojn, manĝi kun infanoj, dormigi, eĉ instrui ilin. Rekompence mi prelegis pri edukstemo en Pollando, pri nia urbo kaj nia infanĝardeno.

— **Impone. Kaj ĉio ĉi helpe de la internacia lingvo?**

— Nur pere de Esperanto! Ja la ĉinan ni ne konas kaj neniu proponis uzi la anglan.

— **Do vi multege devis traduki?**

— Jes, tio estis iom laciga kaj nervostreĉa. Ni ne povis moviĝi sen tradukanto. El la ĉina ĉion senĉese tradukis samideano Dong Shulin, iom helpis aliaj esperantistoj — membroj de la Esperanto Asocio el Zaozhuang.

— **Kaj la dua grava rezulto?**

— Popularigo de Esperanto! Imagu, kiel kortuŝe estis aŭdi salutvortojn en la internacia lingvo en ĉinaj infanĝardenoj. Esperantlingve salutis nin ĉ. 500 ĉinaj infanoj kaj 30 instruistinoj! Ni ankaŭ povis parte partopreni en la Universala Esperanto Kongreso, kiu ĝuste okazis tiam en Pekino. Mia direktorino propraokule povis rigardi multnombrian internacian esperantistaron. Mi opinias ankaŭ tre grava, ke multaj homoj, kiuj ĝis nun ne multe aŭ nenion sciis pri Esperanto, dum niaj streboj organizi la vojaĝon kaj dum la vojaĝo mem eksciis, ke Esperanto egzistas, funkcias, ke ĝi ebligas interesajn kontaktojn ne nur privatajn. Temas ne nur pri la direktorinoj kaj instruistinoj en niaj infanĝardenoj, sed ankaŭ pri multaj oficistoj, kun kiuj ni devis kontaktiĝi, inkluzive la urbestroj de Toruń kaj Zaozhuang kaj gepatroj de infanoj en niaj ambaŭ lernejoj, ne parolante jam pri ĉinaj kaj polaj ĵurnalistoj, kiuj interesiĝis pri la evento.

— **Preskaŭ nekredeble, ke ĉion ĉi vi scipovis organizi kaj travi.**

— Mi ankaŭ ne tute kredis, ke ĉio sukcesos, sed en Toruń ni trovis apogon por nia eksperimento ka la ĉinaj kunlaborantoj traktis nin preskaŭ kiel

diplomatojn kaj zorgis pri ĉiu nia paŝo, do entute ĝis nun ni sukcesis.

— **Kion vi diros por resumi ĉion ĉi?**

— Mi ĝojas. Rezulte de la subskribita interkonsento somere 2005 ĉinoj el Zaozhuang planas veni al Toruń. Jam nun la ambaŭ direktorinoj: Aldona Gajkowska el Toruń kaj Chen Dongmei el Zaozhuang komencis lerni Esperanton!

— **Mi gratulas al vi kaj dankas pro la interparolo.**

Interparolis: Teresa Nemere

Kion opinias pri Esperanto 6-jaruloj el Infanĝardeno „Kangaroo” en Toruń

- Esperanto estas lingvo por tradukado.
- Esperanto estas lingvo, kiun uzas kaj nia instruistino kaj sinjoro el Hispanio.
- Esperantistoj estas konatuloj de sinjorino Grażynka.
- Esperantisto tradukas aliajn lingvojn.
- Esperantisto ĉiĉeronas eksterlandanojn el tuta mondo tra propra urbo.
- Se iu ne konas polan ligvon, povas en Pollando uzi Esperanton.
- Esperantisto povas veturi al alia lando kaj tie oni instruos lin fremdan, nekonatan dancon.
- Esperantisto tradukas kaj liaj konatuloj el tuta mondo scias, kio okazas

en nia lando kaj loko.

- En Esperanto oni tradukas dufoje el ĉina.
- Se homo veturos al Ĉinio, Esperantisto devas al li traduki, ĉar ĉina estas tre malfacila.
- Dank’ al Esperanto ni ekkonas fabelojn pri ĉina murego.
- Esperantistoj povas multe vojaĝi kaj konatuloj rakontas, kio vere estas tie interese.
- Esperantistoj rakontas al gastoj, kio bona estas en lia lando.
- Se iu ne konas Esperanton, en fremda lando enirus kaverno de drako. Sed amiko–Esperantisto tradukos por li ne eniri kaj savos lin.
- Se venos al ni iu anglo, Esperantisto helpos al li amikiĝi kun ni.
- Esperantistoj instruas paroli en propra lingvo kaj gastigas kolegojn.
- Se oni devas en fremda lando pisi, nur Esperantisto montros necesejon.
- Neniu surstrate konas nomon de iu franco, nur Esperantistoj.
- Dank’ al Esperanto nia sinjorino ekkonas multegajn homojn.
- Multaj homoj el tuta mondo povas manĝi ĉe sama tablo kaj komprenas unu la alian.
- Sen Esperanto eksterlande oni povas aĉeti nenion.
- Eksterlande homo ne scipovos aĉeti bileton kaj en buso devos pagi grandan punon. Sed ja Esperantisto povis helpi al li aĉeti la bileton.
- Esperanto estas lingvo, kiu tradukas ĉiujn aliajn lingvojn.
- Se iu estas longe eksterlande

kaj havas longan hararon: aŭ havos pli kaj pli longajn harojn aŭ frizisto fortranĉos malĝuste. Se konus Esperanton, ja lia kolego povus ĉion traduki kaj li aspektus bele.

- Se iu veturos al fremda lando, nur dank' al Esperantistoj ne estas soleca.

- Se oni havas en infanĝardeno instruistino, kiu konas Esperanton, tiam oni amikiĝas kun aliaj landoj.

- Se iu virino devus naski bebon en fremda lando, nur Esperantistoj montros al ŝi hospitalon kaj entute helpos.

- Esperantistoj kun tuta familio povas viziti ne nur landon, sed ankaŭ infanĝardenoj.

- Esperantistoj bonvenas gastojn en flughaveno kaj agrable zorgas ilin tutajn tagojn kaj noktojn.

- Se iu volas aĉeti okulvitrojn eks-terlande, nur Esperantisto diros, kiuj estas bonaj.

- Se iu ne konas aliajn lingvojn, Esperanto sufiĉas.

- Kiam estos Esperanto, tiam estos multaj kolegoj kaj ili ĉiam savos nin.

- Esperantistoj estas en ĉiu lando, ĉie.

- Estas malfacilaj lingvoj kaj facila Esperanto necesas.

- Esperanto estas por ni ĝoju, ke oni ne devas lerni aliajn lingvojn.

- Se iu eklernos esperanton, poste povas lerni ĉinan.

- Kiam mi estis en Germanio mi nenion komprenis. Kaj Esperantisto komprenas ĉie.

Esperanto en scienca konferenco (PL)

En la tagoj 21–23 de oktobro 2004 en ĉelima pola urbo Cieszyn, scienca rondo de Instituto pri Orientslava Filologio de Jagiellona Universitato (UJ) el Krakovo organizis internacian, sciencon konferencon titolitan: „Slavoj en Eŭropo, historio, kulturo, lingvo”. Por partopreni la konferencon venis prelegi junaj sciencistoj kaj profesoroj el diversaj universitatoj el Pollando kaj eksterlando. El Pollando krom organizantoj (UJ) estis reprezentitaj ankaŭ universitatoj el Vroclavo kaj Lodzo.

Por tiu konferenco estis invitita ankaŭ prezidanto de Pola E–Asocio por prelegi pri Esperanto. Prelego titolita laŭ la vortoj de fama profesoro de UJ — Zenon Klemensiewicz: „Esperanto — akiraĵo de pola kulturo” vekis grandan intereson. Dum prelego estis prezentitaj diversaj Esperanto–libroj kaj materialoj. Preleginto respondis multajn demandojn. Junaj sciencistoj interesiĝis pri vojaĝoj realizataj pere de Esperanto. Estis prezentitaj eblecoj kiujn donas „Pasporta Servo”. Partoprenintoj ricevis kopiojn de la paĝo de oktobra gazeto „Rzeczpospolita” kun intervjuo kaj informoj pri Esperanto. Organizantoj invitis la reprezentanton de PEA por la sekvonta scienca konferenco venontjare.

Oni devas aldoni, ke inviton al la konferenco sendis unu el organizantinoj, kiu finis la bazan E–kurson en brazila projekto NESTO, kie ŝia lingva helpanto estis prezidanto de PEA.

Kunsido de la Ĉefa Estraro de Pola Esperanto-Asocio en Gliwice

La 13an de novembro 2004 j. dum sekva laborkunsido, ĉifoje en Gliwice, renkontiĝis la Ĉefa Estraro de PEA.

La kunsido okazis ankoraŭ en etoso de aŭtuna parlamenta debato, kion pruvis sondado de kol. Edward Kozyra. Li, en la nomo de organizinto de la debato — Etsuo Miyoshi, demandis estraranojn pri reagoj flanke de neesperantistoj je artikolo en „Rzeczpospolita”.

La prezidanto de la kunsido post konstato de kvorumo, fikso de kunvena ordo kaj relego de protokolo el pasinta kunveno en Varsovio, permesis al kol. E. Kozyra mallonge prezenti progresantan investaĵon de japana entreprenisto en Malborko kaj komencan pritakson de rezultoj de parlamenta debato je la temo: lingva egaleco en internaciaj rilatoj.

Oni parolis ankaŭ pri ĉijaraj prepaŭroj al Zamenhof-Tago organizataj en diversaj kulturcentroj kaj ankaŭ en polaj diplomataj postenoj de Aŭstrio, Ruslando, Danlando, Litovio ktp., en kunteksto de 145a naskiĝdatreveno de la aŭtoro de Esperanto dro L. L. Zamenhof kaj 50a datreveno de UNESCO-rezolucio koncernanta agnoskon de la lingvo internacia Esperanto.

Organiza kaj financa situacio de PEA permesis lastfoje finance apogi eldonon de kelkaj libropozicioj por lingvolernado kaj informiloj pri la lingvo.

Oni apelaciis al filioj pri urĝa transdonado de statutaj kotizoj destinitaj por la agado de PEA.

Finante prezidanto dankis al partoprenantoj de la kunveno kaj invitis ilin al renkontiĝo kun la unua en historio de Esperanto-movado eŭrodeputitino kaj esperantistino mag. Małgorzata Handzlik el Bielsko Biala.

raportis: A. J. Walaszek



GRUPE-8

Gliwice'a Rendevuo de Uzantoj kaj Praktikantoj de Esperanto, Gliwice 11-14.11.2004

En sudpola urbo Gliwice jam okfoje renkontiĝis esperantistoj por *grupe* partopreni jam tradician esperantistan aranĝon. Venis ĉirkaŭ 70 esperantistoj el multaj regionoj de la lando kaj kelkaj eksterlandanoj. Por la malfermo de la *rendevuo* venis vicprezidanto de Urba Konsilantaro kaj sekciestrino pri sporto kaj kulturo de Urba Oficejo.

Ĉijara GRUPE-8 estis dediĉita al la 145a datreveno de la naskiĝo de Ludoviko Zamenhof kaj 50a datreveno de UNESKO-rezolucio el Montevideo.

Alvenintaj partoprenantoj povis aŭskulti interesajn prelegojn. Pri Esperanto en Afriko kaj lingvaj problemoj en tiu kontinento parolis Moliere Ngangu el Kongo, pri travivaĵoj en Brazilio parolis Ludvik Chytil el Ĉeĥio, pri vojaĝo tra Aŭstralio parolis eksambasadoro Jaroslav Suchanek ankaŭ el Ĉeĥio, pri instruado per muziko parolis Aŭgusto Casquero de la Cruz el Hispanio.

Provokis al la vespera diskutado Stanisław Mandrak per la temo: „Ĉu angla lingvo kostas polojn?” Venis

el Krakovo konata aktorino Jadwiga Gibczyńska, kiu prezentis spektaklon bazitan je la fama verko „La eta princo”; siajn filmojn kaj impresojn pri laŝta UK en Pekino prezentis red. Roman Dobrzyński el Pola TV.

Je la invito de organizantoj venis ankaŭ la unua eŭrodeputatino—esperantistino Małgorzata Handzlik, kiu tre interese rakontis pri laboro en EU. Ŝia edzo Georgo kantis kelkajn ĉiam aŭskultindajn kantojn.

Dum tri vesperoj s—ro Zdankowski gvidis tre interese gramatikajn kvizojn. Krome partoprenantoj povis konatiĝi kun geneologio, Esperanta TV kaj modernaj kursoj de Esperanto. Kiel dum multaj pasintaj jaroj kun nova programo venis koruso „KAMEA” el Krakovo.

Ĉiu konstatis ke GRUPE—8 sukcesis. Aranĝo okazis en Gliwice’a Centro de Neregistaraj Organizaĵoj, kie estas bonaj kondiĉoj por funkciado kaj organizado de kunvenoj.

Ĉiuj partoprenantoj jam ĝojas veni al Gliwice denove venontjare, por partopreni Esperantan, novan rendevuon GRUPE—9.

Raporton preparis

Stanislavo Mandrak

Konciza raporto pri ĝenerala kunveno de koŝalinaj esperantistoj

La 18an de novembro 2004 okazis ĝenerala kunveno de koŝalinaj esperantistoj por sumigi la pasintan 3—jaran agadperiodon kaj elekti novan estraron de koŝalina Filio de PEA, kies

historio komenciĝis en la 1959 jaro.

Ampleksan raporton pri Esperanta agado de la Filio prezentis Czesław Baranowski, la ĝisnuna prezidanto. La Revizia Komisiono donis plenan aprobon al la ĝisnuna laboro de ĉiuj estraranoj. Tre alte pritaksita estis la agado de prezidanto, konstante zorganta pri popularigo de la lingvo internacia en koŝalina regiono kaj pri bona organizado de ĈEP—aranĝoj. Li fruktdone kunlaboras ankaŭ kun Gimnazio n—ro 7, kie jam la duan jaron estas instruata Esperanto kadre de lerneja projekto *Comenius*.

Post mallongdaŭra diskuto okazis elektado, kiu ne alportis ŝanĝojn en la ĝisnuna estrarkonsisto. La novan estraron eniris kvar personoj, kiuj jene dividis inter si la funkciojn:

1. Baranowski Czesław — prezidanto de la Filio kaj samtempe ĉeforganizanto de ĈEP—aranĝoj en Mielno.

2. Sobieraj Tadeusz — vicprezidanto de la Filio, organizanto de klubaj vesperoj.

3. Linke Zygmunt — sekretario

4. Adaszewski Henryk — kasisto.

La prezidantecon de Revizia Komisiono transprenis d—ro Marian Łaba.

La Elektan Kunvenon de PEA—delegitoj, okazontan en la 2007 jaro, partoprenos Czesław Baranowski.

Dum la ĝenerala kunveno estis decidite:

- plu kunvenadi en la gastama klubo de Koŝalina Loĝkooperativo „Nia Domo” (okazigi kunvenojn la unuan

kaj la trian jaŭdon ĉiumonate),

- daŭrigi organizadon de tradiciaj ĈEP-aranĝoj en Mielno,
- konstante kaj diversmaniere popularigi Esperanton en amaskomunikiloj, en lernejoj kaj en la nova E-vitroŝranko, troviĝanta en la centra parto de la urbo,
- organizi fundamentajn kursojn de Esperanto, por varbi novajn membrojn al koŝalina Filio de PEA,
- profundigadi amikajn rilatojn kun eksterlandaj gesamideanoj, kadre de novaj eblecoj, kiujn donis al ni Eŭropa Unio.

La 27a Ĉebalta Esperantista Printo en Mielno okazos en la tagoj 15–23 de junio 2005 jaro. Oni povas ricevi detalan informilon pri la aranĝo skribante al: Pola Esperanto Asocio, Filio en Koszalin, poŝtkesto 30, 75–016 KOSZALIN 1, aŭ sendante retmesaĝon al: barslavo@wp.pl.



Bydgoszcz – Centro pri Kulturo kaj Turismo

En la urbodomo de Bydgoszcz okazis estrarkunsido de la Internacia Centro pri Kulturo kaj Turismo, kies prezidanto Konstanty Dombrowicz estas samtempe Prezidento de la urbo Bydgoszcz (400 mil da loĝantoj). Krom la estraranoj de la Centro ĉeestis invititaj:

— Augusto Casquero de la Cruz el Hispanio — Vicprezidanto de la Internacia Klubo „Esperantotur”(IKE),

kiu jam trian jaron instruas Esperanton kaj hispanan lingvon en la Internacia Studumo pri Turismo kaj Kulturo (ISTK) en Bydgoszcz,

— Moliere Nangu Nduantoni el DR Kongo, estrarano de la IKE, kiu ankaŭ la trian jaron instruas en ISTK afrikajn kaj francan lingvojn,

— Liu Jianguo el Ĉinio, Vicprezidanto de IKE, kiu jam de kelkaj jaroj kunlaboras kun Bydgoszcz, kiel Estro de E-Instituto pri Turismo en Hefei, kaj

— S-ino Ruan Liping — la Dekanino pri Turisma Fako de la Universitato pri Administrado en Pekino, kiu decidis regulan sendadon de ĉinaj gestudentoj por studado ĉe ISTK/AKB en Bydgoszcz.

La Prezidento de la Urbo enmanigis al ĉiuj gastoj kiel dankesprimon pro la kunlaboro — albumon pri Bydgoszcz kun aldone presita teksto en Esperanto (kiun ni kunsendas kiel aldonajon).

Sekve oni pridiskutis la promociadon de la urbo Bydgoszcz pere de Esperanto. Estis akceptita plano de la plej proksimaj aranĝoj, en kiu la ĉefaj promociaj E-aranĝoj estas:

— **Zamenhofaj Tagoj** en Bydgoszcz dum 3–10 de decembro 2004 kun ISTK/AKB Sesio pri „Lingvoj, sano, amo en turismo”. La partopreno dum 3–10 decembro kun ok tranoktoj en studenta domo en Bydgoszcz kostas 100 EUR aŭ 100 USD.

— **Internacia Pedagogia E-Kurso** dum 11–20 de februaro 2005, kiun gvidos Asci Ewa Bondar de IEI en Ha-

go, Asci Augusto Casquero de la Cruz, red. Barbara Pietrzak el Pola Radio, Marcel Delforge el Belgio, kelkaj polaj fakuloj pri glottodidaktiko kaj pedagogio el la Centro pri Edukado por Instruistoj kaj reprezentantoj de ILEI. Samtempe okazos kursoj de fotado kaj video-filmado gvidataj de Zdzisław Błazejczyk, red. Roman Dobrzyński kaj Romuald Puciul. Ĉiuj kursoj dum 11–20 de februaro kun naŭ tranoktoj, asekuro kaj parta manĝado koston 200 EUR aŭ 200 USD.

— **30 Esperanto-Tagoj de Bydgoszcz** kun 27 Internacia AKB-Sesio kaj Internacia Kurso por Esperanto-vojaĝgvidantoj dum 23 aprilo–3 majo 2005 sub Honora Protektado de la Prezidento de la Urbo Bydgoszcz — Konstany Dombrowicz. La aranĝo same koston 200 EUR aŭ 200 USD.

Eblas ankaŭ aliĝi por Vintra-Prin-tempa Semestro de ISTK/AKB en Bydgoszcz dum 15 de januaro ĝis 3 de majo 2005. La studadkoston estas 200 EUR aŭ 200 USD + loĝado, manĝado kaj asekuro (ĉ. 100 EUR aŭ 100 USD monate).

Eblas jam aliĝi por la studado ĉe ISTK/AKB en Bydgoszcz por la studjaro 2005/2006. La studadkotizo ĝis la 31a de decembro 2004 estas sama (200 EUR / USD), informojn ni sendos laŭ peto.

La estrarkunsido finiĝis per komunaj fotoj en la belega historia prezidenta salono de la urbodomo en Bydgoszcz. Poste oni vizitis urbon Bydgoszcz kaj ankaŭ Instituton pri

Geografio de Bydgoszcz-Akademio, kie instruas AProf. dr hab. Aleksandra Kowalczyk, sub kies scienca patroneco jam pli ol 50 gestudentoj de ISTK bakalaŭriĝis kaj magistriĝis ĉe Akademio Internacia de la Sciencoj (AIS).

Oktobre en Bydgoszcz-Akademio komencis instrui la hispanan lingvon Augusto Casquero de la Cruz, kiu eble tie instruos ankaŭ Esperanton.

Venu al Bydgoszcz por kune kun gestudentoj el 15 landoj de Afriko, Azio kaj Eŭropo studi turismon, kulturon kaj lingvojn en la sola en la mondo klerigejo, kie oni ĉiutage instruas en Esperanto.

**Internacia Centro
pri Kulturo kaj Turismo
str. M. Skłodowskiej-Curie 10
PL 85-094 Bydgoszcz, Pollando
tel/fakso: (48-52) 346-11-51
info@esperanto-turismo.com
www.esperanto-turismo.com**



Esperanto en la Universitato de Poznań

En Adam-Mickiewicz-Universitato en Poznań (Pollando) okazas ekde kelkaj jaroj du diversspecaj kursoj pri Esperanto. La *unua* el ili funkcias ekde la somera semestro 2002 kiel nedeviga kursaro por studentoj de aplikata lingvistiko en Katedra Glottodydaktiki i Translatoryki (Instituto pri Lingvodidaktiko kaj Tradukado), ul. 28 Czerwca 1956 r. nr 198, PL 61-485 Poznań, rete: a.sakaguchi@gmx.de. Lekciisto de tiu instruaranĝo estas prof. d-ino Alicja Sakaguchi, absolvento de

la budapeŝta Esperanto-Fako en 1979 kaj la ununura ĝisnun habilitiĝinta¹ diplomita esperantologo², ekde 2003 profesoro en la supre menciita instituto. La *dua* el ili estas Postdiploma Interlingvistika Kurserio por personoj el Pollando kaj eksterlando kun meza aŭ altlerneja edukado, kiuj regas Esperanton. Ĝi okazas ekde la akademia jaro 1997/98 kaj estas subordigita al la dekano de la Novfilologia Fakultato. La Postdiplomano Kursaron gvidas d-ino Ilona Koutny, absolvento de la budapeŝta Esperanto-Fako en 1977, plurjara kunlaborantino de tiu instruunu, nuntempe adjunkto en la Hungara Fako situanta en Instytut Lingwistyki (Instituto pri Lingvistiko), ul. Międzychodzka 5, PL 60-371 Poznań, rete: ikoutny@amu.edu.pl.

La kursoj en Instituto pri Lingvodidaktiko kaj Tradukado ampleksas 60 studhorojn po akademia jaro, t.e. 30 horojn po semestro. La temoj de la kursoj varias depende de la fiksitaj akcentoj, ekz. „Strukturaj kaj sociaj aspektoj de Esperanto”, „Esperanto en teorio kaj praktiko”, „Kontrastaj

aspektoj de la pola, germana kaj Esperanto”. La instruaraĝoj estas dupartaj: en la unua parto (prelego/seminario) traktiĝas teoriaj aspektoj kaj la duan parton konsistigas praktika kurso de Esperanto. La unua kursparto baziĝas sur teoriaj konceptoj de planlingvoj prezentitaj en la habilitiga laboraĵo de Alicja Sakaguchi „Interlingvistiko: objekto, celoj, taskoj, metodoj” (492 paĝoj, publikigita 1998 germane en Peter Lang-eldonejo). Ankaŭ aliaj publikaĵoj de la aŭtorino servas kiel materialbazo. La kursojn frekventas 20 ĝis 30 studentoj (ĉiuj regas la polan, germanan kaj anglan). Atesto de sukcesa partopreno okazas surbaze de referaĵo aŭ hejmtasko.

La Postdiploma Interlingvistika Kurserio okazas kontraŭe al tagaj kursoj laŭ la sessemestra modelo de telestudado (ekstera studado). Tiu ampleksas 220 instruhorojn dum tri jaroj. La unusemajnaj sesioj okazas dufoje en la jaro (fine de septembro kaj fine de februaro dum universitataj ferioj). La kursoj estas pagataj far la kursanoj. Postdiploma Interlingvistika Kurserio estas praktikorientita kaj celas konatigi la partoprenantojn kun la esenco kaj problemaro de la internacia lingvokomunikado. La instruado okazas en Esperanto. Prelegantoj el Pollando kaj eksterlando formas la teman profilon. La nombro de la partoprenantoj estas limigita al 25 personoj. Absolventoj de la kurserio posedantaj universitatan/altlernejan diplomon ricevas surbaze de laboraĵo atestilon pri fino de postdiploma kursaro, kaj tiuj kun mezgrada edukado — atestilon pri fino de interlingvistika kursaro.

La supra prezento montras, ke en

¹ Habilitiĝo (lat. *habilis*, ‘kapabla, taŭga’) estas procedo por akiri (far posedanto de doktorgrado) rajton memstare instrui kaj esplori en universitata domeno. Tiu kvalifiko estas (en Germanio, Aŭstrio, Svislando, Pollando kaj kelkaj aliaj landoj) necesa por fariĝi docento aŭ profesoro.

² Studi Esperantologion kaj diplomigi pri tiu fako eblis ĝisnun nur en ELTE-Universiatio en Budapeŝto. Ĝis la jaro 2000 diplomigis tie pli ol 100 studentoj, doktoriĝis 7-8 personoj.

Poznań okazas *duspecaj* kursoj pri Esperanto, adresitaj: (1) al filologistudentoj *de* la Universitato Poznań sen antaŭaj konoj de Esperanto kaj (2) al personoj *el ekster* Universitato Poznań kun minimume meza edukado, sen aĝlimigo konantajn Esperanton. Tiu duterena instruado favore kontribuas al konigo de la historio, socia bazo kaj strukturo de Esperanto. Ĝi ankaŭ instigas la kursanojn al pli profundaj konsideroj pri la fenomeno „internacia artefarita lingvo” kaj speciale „vivanta planlingvo”. Tio ankaŭ pozitive influas elformiĝon de kritika pozicio al kelkaj postsekvoj en la evoluo de Esperanto.

prof. dr hab. Alicja Sakaguchi
13.11.2004



La „Ĉeriza ĝardeno” en Esperanto. Esperantista kontribuo al la jaro de Ĉeĥov

Ekde 2000 „Sezonoj” ĉiujare eldonas unu ampleksan libron el la rusa klasika literaturo: „Resurekto” de Tolstoj (2000), „Malvivaj animoj” de Gogol (2001), „Blankaj noktoj” de Dostojevskij (2002) kaj „Rusa novelaro. La 19a jarcento” (2003).

Ĉi-jare aperis, okaze de la 100a mortdato de Anton Ĉeĥov, jubilea kolekto de Anton Ĉeĥov „Ĉeriza ĝardeno”. Ĝi enhavas 36 rakontojn, novelojn kaj dramojn de Ĉeĥov, inter kiuj estas jam klasikiĝintaj „Sveda al-

meto”, „Dika kaj magra”, „Ĥameleono”, „Ĉevala familinomo”, Ivaĉjo”, „Enua historio”, „La homo en ujo”, „La damo kun hundeto”, „Urso” kaj la titola dramo „Ĉeriza ĝardeno”.

La tekstojn tradukis Aleksander Korĵenkov, Aleksej Birjulin, Viktor Kudrjavcev, Valentin Melnikov kaj aliaj elstaraj ruslandaj tradukantoj. Ilin kontrollegis sep okcident-eŭropaj kompetentuloj.

Mendu la 352-paĝan libron, kiu estis lanĉita en BET-40 (Birŝtonas, Litovio) precize je la centa mortdato de Anton Ĉeĥov, en la libroservo de UEA aŭ ĉe via kutima libroservo kontraŭ 27 eŭroj.

Agrablan legadon!

Halina Gorecka



Abonu Esperanto-revuojn, por subteni ilian ekziston kaj profiti de ilia enhavo! Ni elkore rekomendas:

TORNADO

MAGAZYN MŁODZIEŻY W MIĘDZYNARODOWYM JĘZYKU ESPERANTO
MIESIĘCZNIK

Informator wewnętrzny Klubu „Varsovia Vento” — w języku polskim; ukażuje się 10 razy w roku. Redakcja: Varsovia Vento, 03-226 Warszawa, Toruńska 82/133, viavento@poczta.onet.pl

La Ondo de Esperanto

INTERNACIA SENDEPENDA MAGAZINO

Bone konata kaj ŝatata monata revuo, eldonata en Kaliningrado. Abono pere de la ĈE de PEA, Gliwice, staman@ka.onet.pl

Nobelpremiito profesoro Selten lektiis esperantligve en Politekniko Lublina



La 24an de septembro '04 gastis en Politekniko Lublina prof. d-ro, d-ro h.c. mult. Reinhard SELTEN el la Universitato en Bonn, Germanio, nobelpremiito pri ekonomiko en 1994. Profesoro Selten estis invitita kiel honora gasto de la Rektoro de la Politekniko prof. d-ro Józef KUCZMASZEWSKI. La vizito okazis enkadre de Lublina Festivalo de Scienco.

Profesoro Selten lektiis en plenigita aŭlo de la Politekniko. La lekcio pri la temo „Imita ekvilibro de firmaoj sekvantaj strategion de la sukcesgvidanto en situacio de oligopolo” estis prezentita esperantlingve kaj samtempe tradukata en la polan lingvon fare de prof. Witold STĘPNIEWSKI la Vic-rektoro de la Politekniko por scienco kaj eksterlanda kunlaboro.

La lekcio de profesoro Selten estis grava evento en scienca medio de Lublino kie studas ĉirkaŭ cent mil studentoj. Ĝi estis ankaŭ grava por la lingvo internacia, ĉar je la unua fojo en Lublino oni oficiale lektiis en Esperanto pri nova scienca koncepto al multaj profesiuloj, studentoj kaj eminentuloj. En la lekcio partoprenis ankaŭ profesoroj kaj studentoj de la kvina bakalaŭra studsesio de AIS, kiu samtempe okazis en la Politekniko. Interalie ĉeestis Prezidanto de UEA prof. Renato CORSETTI el la Roma Universitato „La Sapienza”, prezidanto de Akademio Internacia de la Sciencoj prof. Helmar FRANK el la Universitato Paderborn, prof. Ludoviko



Kristoforo ZALESKI-ZAMENHOF nepo de la kreinto de Esperanto, prof. Zdzisław TARGONSKI rektoro de Agrikultura Universitato en Lublino, prof. Jan GLIŃSKI prezidanto de Lublina Branĉo de la Pola Akademio de la Sciencoj, prof. Hans-Dietrich

QUEDNAU el la Teknika Universitato en Munkeno (Germanio),
docento Alicja LEWANDERSKA kaj d-ro Zbigniew GALOR
ĝisnuna prezidanto de AIS Pollando.

Post la lekcio dum la solena vespermanĝo dediĉita al prof.
SELTEN kaj sinjorino Elizabeta SELTEN partoprenis vicrektoroj de
lublinaj universitatoj prof. Józef FERT (KUL), prof. Karol
WYSOKIŃSKI (UMCS), prof. Kazimierz GŁOWNIAK (Medicina
Akademio). La rolon de mastro plenumis prof. Witold
STĘPNIEWSKI vicrektoro de la
Politekniko.

Indas aldoni, ke en la studdirekto
Inĝenierio Media de la Politekniko Lublina
ekde 6 jaroj Esperanto estas instruata kiel
elektebla lingvo dum du semestroj (entute
60 horoj). La lektoro estas konata tradukisto
Tomasz CHMIELIK. Ĉirkau 40% de la
studentoj de la studdirekto elektas
Esperanton (ĉijare 70 personoj).



W. Stępniewski kaj B. Kijak



Estimataj amikoj, kore salutante el Ukrainio, mi invitas vin partopreni la 17an
E-festivalon AROMA JALTO (30.04 — 09.05.2005). Estas peto laŭeble publiki-
gi informon pri ĝi en via organo POLA ESPERANTISTO. La 1an informleteron
pri la AJ mi aldonas.

Multajn sukcesojn al vi kaj feliĉon! Amike,

Volodimir HORDIJENKO

AROMA JALTO

La 17a Esperanto-festivalo

Jalto printempe estas io eksterordinara. Vekiĝanta montaro, verdĝanta
arbaro, freŝaj herboj, aromoj de floroj kaj senlima blua Nigra maro. Muĝo
de ondoj, forkurantaj al horizonto, varmaj ŝtonoj kaj printempa karesa su-
no, varmiganta animon kaj koron.

Jalto printempe estas la renkontiĝo de geamikoj, kiujn kunligas komuna
lingvo, similaj interesoj kaj frateca etoso. Jalto printempe estas paradizo

sur Tero, kiu vizitendas, almenaŭ unufoje dum la vivo.

Loko: Krimeo, Jalto – la plej populara kaj fama kuraĉloko de Ukrainio

Tempo: 30.04-09.05.2005.

Loĝado: En 2-litaj ĉambroj kun lavabo, necesejo kaj duŝejo, kontraŭ 6 EUR diurne.

En 3-litaj ĉambroj kun lavabo, necesejo kaj duŝejo, kontraŭ 5 EUR diurne.

En 4-litaj ĉambroj kun lavabo kaj necesejo, kontraŭ 4 EUR diurne.

En 5-litaj ĉambroj sen luksaĵoj, kontraŭ 3 EUR diurne.

Loĝado ne estas ebla sen nutrado.

Nutrado: En la sama ripozejo, 3-foje tage, kontraŭ 3,5 EUR.

Programo: Seminarioj por Esperanto-instruantoj, seminario de INTER-KULTURO, lingvaj diversgradaj kursoj, Universitato, lingva prezentado, ekskursoj, piedmarŝoj, koncertoj, KGS, ludoj...

Lingva ordo – tradicie severa. Nulaj komencantoj ne estas akceptataj. Dum la registrado Vi devas respondi al simplaj demandoj.

Aliĝkotizo (EUR):

№	Aliĝkategorio	ĝis la 1a de marto 2005	surloke
1	UkrEA-membroj	4	6
2	Ekssovetio, inkl. ukrainanoj	6	10
3	B-landoj	10	15
4	A-landoj	15	30

Kontribuantoj al la programo havas rabaton laŭ interkonsento.

La organiza komitato:

Volodimir Hordijenko, Kijiv – ĉeforganizanto, loĝado, financoj, sportaj aranĝoj;

Atilio ORELLANA ROJAS, Den Haag – seminario por Esperanto-instruantoj;

Ilona Koutny, Poznań – instruado por perfektiga grupo, Universitato;

Ole Pokotilo, Kijiv – instruado por paroliga grupo, verda polico, Universitato;

Anna Dubrovina, Kijiv – instruado por komencanta grupo;

Aleksandro Koval, Gomel – aktualigo de la retpaĝo, koncertaj programeroj, Universitato;

Ana Montesinos, London – Universitato, lingva prezentado.

Katerina Semjonova, Berdjansjk – interkona vespero, KGS;

Aleksandra Gricenok, Kijiv – lingva prezentado, adiaŭa balo, informtabulo;

Vjaĉeslav Katin, Jalto – piedmarŝoj, lokaj zorgoj;

Miĥail Ĵdanov, Jalto – ornamado, artaĵoj;

Jelena Snigirjova, Jalto – ekskursoj.

La aliĝilon kaj aliĝkotizon bonvolu sendi al Volodimir HORDIJENKO ĝis la 1a de marto 2005 al la adreso: p.k. 35, Kijiv-133, UA-01133, Ukrainio.

Telefono: (044) 295 1701; Retpoŝto: volodimir_h@ukr.net

Retpaĝo: www.aromajalta.by.ru;

La duan informleteron ricevos aliĝintoj. Bonvenon E-parolantoj!

MEMBRIĜU!

ILEI (Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj) invitas ĉiujn, kiuj interesigas pri progresado de Eo k pri E-instruado. Membrokotizo por 2005: 54 zl — kun paperaj Internacia Pedagogia Revuo kaj Ligilo; 14 zl — kun elektronika IPR kaj papera Ligilo. La membroj ricevas la revuojn sen kroma pago.

Nova JUNA AMIKO!

— revuo + retejo —

Ene, kiel kutime: bildvortaro, interesaĵoj, kantoj, ludoj, Komputika Esperanta Rondo k.a.

Nova enhavo de la revuo, i.a. folioj pretaj por kopiado al grupoj, legaĵoj kun ekzercoj, preparado por E-ekzamenoj, ludoj, rubrikoj — i.a. popol-kutimoj.

En la Interreta parto de la revuo, i.a.: aldonaj artikoloj, materialoj, ekzercoj, ludoj.

Abono por 2005: 39,50 zl.

SCIENCA REVUO

— tre interesa, kvaronjara. Abono por 2005: 49,50 zl.

La kotizojn kaj abonojn akceptas: Magdalena Tatara, 32-020 Koźmice Wielkie 323, k/Wieliczki.

Informoj — ĉe Maria Majerczak, tel. (012) 638 14 49.

Mi salutas vin kore

Maria Majerczak

Helpu nin helpi esperantistojn. Donacu por la kampanjo „Esperanto en la bibliotekoj!”

Lastatempe vi povis legi pri sendado de multaj libro-pakaĵoj al bibliotekoj publikaj kaj de Esperanto-grupoj tra la mondo. La librojn sendas ĉefe Aloísio Sartorato ludoviko44@yahoo.com.br, de la Kultura Kooperativo de Esperantistoj en Brazilo, kaj komisiito de UEA por la kampanjo „Esperanto en la bibliotekoj!”. Sed ankaŭ la Kansaja Ligo de Esperanto-Grupoj en Japanujo regule sendas librojn al eksterlandaj bibliotekoj kaj UEA mem sendas kaj SAT-amikaro, ktp.

La sendado estas financata de esperantistoj. En UEA oni sendu sian kontribuon per la kutimaj pag-manieroj al la Fondaĵo Edukado kun la indiko „Bibliotekoj”.

P.S. Se vi sendas monon al UEA por la Fondaĵo Edukado, bonvolu tion klare mencii sur la pagilo. Pagmanieroj estas troveblaj en Jarlibro de UEA p. 33.

Unu el la pagmanieroj estas: Poŝtbankkonto 37 89 64, Universala Esperanto-Asocio, Rotterdam. IBAN: NL24PSTB0000378964 (kvar nuloj, ne majusklaĵ literoj O) SWIFT: PSTB NL21.

Mencio de IBAN kaj SWIFT kodoj permesas senpagan transkontigadon en Eŭropo.

Renato Corsetti

Rakonto pri Popiel

Proksime de la urbo Gniezno, apud la lago Gopło troviĝas la kastelo Kruszwica. En ĝi loĝis la princo Popiel, kiu estis la posteulo de Lech.

Popiel estis tre severa reganto, kaj li insiste aspiris atingi pli fortan aŭtoritaton ol havis liaj antaŭuloj. Li volis regadi mem sen konsiloj de aliaj homoj, des pli ke lia germana edzino ofte rakontis, ke ĝuste tiel kondutas la princoj en Germanio.

Sed en pola lando de longa tempo estis kutimo, ke en okazo de bezono la reganto vokis pli noblajn bienulojn al popola kunveno, dum kiu ili debatis kaj decidis pri la plej gravaj ŝtataj aferoj.

Popiel ne deziris subteni tiun tradicion, kaj sekve de tio ribeligitaj bienuloj ne volis kune kun li batali kontraŭ malamikoj, kaj ili ne plu obeis liajn ordonojn.

La princo timis, ke tiun situacion elprofitos liaj onkloj, kiuj kun la bienuloj forprenos lian regadon. Do li preparis kontraŭ ili teruran ruzajon.

Popiel invitis familianojn al la festeno, dum kiu li regalis ilin per la vino en kiun antaŭe lia edzino enverŝis venenon.

Ĉiuj gastoj pereis, kaj liajn kadavrojn oni ĵetis en la lagon. Popiel tute ne supozis, ke tiu kruela ago baldaŭ estos punita.

En la korpoj de mortigitaj onkloj koviĝis miloj da musoj, kiuj ekkuris al Kruszwica, rekte al la kortego de la krimulo. Terurita Popiel ne scipovante batali kun tiu stranga malamiko, klopodis savi sin kaj sian familion per forkuro. Ili kaŝis sin en la ŝtona turo sur la insuleto, troviĝanta meze de la lago. Sed la musoj naĝis post ili, kaptis ilin, kaj ĉiujn formordis.

Okaze de tiu evento, en krakova kastelo troviĝas la prezentaĵo pri muso manĝanta Popielon — ĝi estas kiel averto, ke Dio punas kruelajn regantojn ne nur per infero post la morto, sed ankaŭ per aliaj manieroj dum la vivo.

